


Usona Esperantisto

Bulteno de Esperanto-USA - N^o 2025:3



Internacie, interamike



Fotintoj (laŭorde): Lua HALL, Stela BESENYEI-MERGER, Ismael ÁVILA, John HUANG, Stela, Ilia DEWI

Manifesto de Toronto	p.3
informado	
Formala konstato de la partoprenantoj de la ĉi-jara Dulanda Kongreso en Toronto pri la situo de la Esperanto-movado rilate la lingvan problemon kaj la homan problemon.	
Aliaj rezolucioj	p.4
Du aliaj rezolucioj publikigitaj lastatempe de Esperanto-kunvenoj ekster Nord-Ameriko, kun celoj kaj temoj kompareblaj al tiuj de la Manifesto de Toronto.	
Anoncoj	p.5
Rezultoj de la ĉi-jara balotado • <i>Centvorte</i> nun haveblas • Stela atingo en nia firmamento • Nekrologo de Arlyn KERR • La 111-a UK okazos en 2026 — en Graz, Aŭstrio! • Juna Instruisto de la Jaro • Vikipedio atingis 375 000 artikolojn • Sukcesintoj pri la KER-ekzamenoj el Usono • Usonanoj rikoltis multajn premiojn en la Belartaj Konkursoj por 2025 • Esperanto-USA Gift Acceptance Policy • Asocio Nova Familio: Orfejo Klara Zamenhof en Goma	
De la kasisto	p.13
2025 K2 Financa ĝisdatigo • Financa terminaro, parto 3	
Estrar-kunsidoj, Jun-Jul	p.15
de la estraro	
Resumo de protokoloj de estrar-kunsidoj por Junio kaj Julio, 2025.	
Senteme	p.16
enigmoj • Kartero WILLIAMS	
Nova krucvortenigmo je 9×9 ĉeloj.	
Solve: <i>Hans-Paulige</i> el N^o 2025:2	p.17
enigmo-solvoj	
Solve de la pasintnumera krucvortenigmo.	
Kongresaj raportoj	p.18
Raportoj el pluraj ĉi-someraj kongresoj.	
Bildstrioj	p.26
serĉoj	
Freŝa strio de <i>La vivo de Peĉjo</i> , kaj enkonduko de nova serio, <i>Kaĉo sen ĉapelo</i> !	
CALICO kaj Esperanto	p.27
lingviko • Derek ROFF	
Vi eble ne konas tiun ĉi usonan neprofitcelan organizaĵon, kiu havas dum jam jardekoj amikan rilaton kaj komunajn celojn kun Esperantujo!	
Pico	p.28
senintenca esperantaĵo • LUKA HALL	
Picejo ĝuste nomita.	
<i>La danĝera lingvo</i>	p.29
libroj • LUKA HALL	
Aktuala resumo kaj sintezo de la libro, kiu pritraktas la historion de persekutado kontraŭ Esperanto.	
Mikronoveloj	p.31
Tri mikronoveloj pli.	
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj	p.32
informado	

Manifesto de Toronto

Verkita en la Tago de Espero, la 12-an de Julio 2025 dum la Dulanda Kongreso en Toronto, kaj proponata al ĉiuj Esperantistoj de bona volo tra la mondo

Ni, Esperantistoj de diversaj landoj kaj fonoj, konstatas, ke

- la organizita Esperanto-movado alfrontas krizon de identeco unu kvaronon tra la dudek-unua jarcento, trovinte nek en la Esperanta kulturo nek en la pledado por lingvaj rajtoj kaj plurlingveco ekzistokialon konvinkan kaj pluvivigan; kaj plu konstatas, ke
- la tiel-nomata monda lingvo-problemo, kiun Esperanto de sia komenco klopodas solvi, ne estas solvita de la grandaj koloniaj lingvoj; efektive, oni pretendas solvadi ĝin en la nuna epoko per la Artefarita Intelektio tiel, ke homoj povos por preskaŭ ajna celo libere komunikiĝi inter si; kaj plu konstatas, ke
- ŝovinismo, militismo, kaj kontraŭhoma retoriko kreskas tra la mondo, almenaŭ parte reage al la malhomigaj efikoj de la pandemio, ronĝata demokratio, klimatsanĝiĝo, kaj kreskanta malegaleco ene de landlimoj kaj inter landoj.

En ĉi tiun samtempe esperigan kaj senesperan epokon, kaj al nia movado kaj al la cetera mondo hejme, komunume, propralande, kaj internacie, ni deklaras, ke

- la organizita Esperanto-movado kiel eble plej urĝe devas montri al la tuta mondo ne nur ke ĝi estas movado de homoj pasiaj pri edukado, lingvoj, demokratio, kaj homaj rajtoj, sed aldone ke ĝi proponadas al la mondo unikan renkontiĝejon interhoman, kiu povas rehomigi la homaron kaj esplori la demandon “kion signifas homi” el ĉiaj eblaj perspektivoj; kaj plu deklaras, ke
- por kreskigi Esperanton, necesas ne honti pri ĝia unikeco, nek deziri ke ĝiaj koridoroj estu similaj al tiuj de neprofitcela organizaĵo, registaro, aŭ internacia instanco; por ĉi tion atingi, la Esperanto-movado ne devas resti marĝena frakcio, sed devas resti principe interhoma kaj desubisma por ne subfosi sian eblon senpere konatigi la homojn unu al la aliaj profunde; kaj plu deklaras, ke

- la problemoj de malhomigo kreskos kun la disvastiĝo de Artefarita Intelektio, forigante komunikajn barojn dum ĝi forprenos la laboron kaj la sciaron de granda parto de la homaro per siaj superaj scio kaj analizemo; kaj plu deklaras, ke
- ni trovas en nia historio la kontraŭdozon kaj al movada stagnado kaj al la ĝenerale kreskanta malhomigo, nome la internan ideon de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof: “forigi la murojn inter la gentoj kaj alkiutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton;” lia insistado, ke Esperanto estas kaj devas esti pli ol nur meĥanika solvo, pulsas eĉ pli forte en la nuna mondo ol iam ajn antaŭe pro la ekzisto de meĥanika solvo al la monda lingvo-problemo; kaj plu deklaras, ke
- interne kaj ekstere, oni komprenu la neŭtralismon de la Esperanto-movado ne kiel artifikon por ŝajne ŝvebi super politikaj konfliktoj, sed kiel manieron konservi la interhoman esencon de nia lingvo esprimatan en la interna ideo; tial, la partoprenado de Esperantistoj en movadoj ŝovinismaj, militemaj, kaj kontraŭhomaj subfosas niajn plej esencajn valorojn kaj malhelpas nian movadon; kaj plu deklaras, ke
- Esperanto ne nur kunligas homojn, ĝi plu homigas ilin per neatenditaj malkovroj pri nia komuna homeco; ĝiaj parolantoj kaj organizaĵoj en la nuna epoko havas la ŝancon manifesti tion klare per siaj kongresoj, komunikaĵoj, kaj eventoj, forskuante la polvon de la pasinteco cele al nova futuro kaj por Esperanto kaj por la homaro.

Ĉi tiun manifeston jam subskribis Esperanto-USA, la Kanada Esperanto-Asocio kaj la Brazilo Esperanto-Ligo.

REZOLUCIO DE LA 110-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN BRNO

Inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2025 kunvenis 1132 homoj el 63 landoj en Brno, Ĉeĥio, por partopreni en la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Ni diskutis la temon *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj*. Samtempe ni ilustris per nia propra agado, kiel bone la internacia lingvo Esperanto servas kiel ponto inter malsamlingvanoj el diversaj landoj kun diversaj spertoj kaj opinioj. Limiginte la traktadon de novaj teknologioj al ties komunikaj aspektoj, ni verkis raporton kaj surbaze de ĝi tiun ĉi rezolucion:

Kun ĝojo ni konstatas, ke la novaj komunikaj teknologioj ebligis signifan kreskon de la nombro de praktike atingeblaj Esperanto-parolantoj, pro kio la kono de Esperanto en konektita mondo fariĝas ĉiam pli valora por atingi de paco kaj konfido inter la popoloj;

Ni notas, ke artefarita intelekto (AI) por maŝina tradukado kaj, helpe de tio, multlingva komunikado fariĝis malmultekostaj kaj vaste uzeblaj;

Samtempe ni notas, ke la instigoj lerni fremdajn lingvojn malfortiĝas i.a. pro la uzo de AI kaj reduktiĝas lingva egaleco, kondukante al kultura provincismo;

Kun zorgo ni konstatas, ke estiĝas abundego da ciferecaj komunikiloj, per kiuj multaj homoj emas aliĝi al fontoj de informado kun samopiniaj grupoj, fortigante polusigon en la socio;

Ni atentigas, ke Esperanto plene taŭgas kiel internacia lingvo kaj jam posedas tutmondan komunumon de parolantoj, kiu kiel movado subtenas respekton kaj valorigon de fremdaj lingvoj kaj kultura diverseco;

Pro tio ni alvokas registarojn kaj la civilan socion en ĉiuj landoj:

- reveni al instruado ankaŭ de najbaraj lingvoj kaj enkonduki Esperanton kiel lernejan fakon por fortigi la senperan kontakton al najbaraj kulturoj kaj la neŭtralan alproksimiĝon al aliaj lingvoj; kaj
- labori por plifortigi la statuson de lokaj lingvoj kaj Esperanto kompare kun tiu de hegemoniaj lingvoj;

Ni konkludas, ke:

- reciproka konfido povas kontribui al harmonia, respekt plena, sekura kaj interkultura socia etoso kaj redukti la disdividajn fortojn en la socio;
- respekto por lokaj kulturoj portataj de lokaj lingvoj tiel plifirmiĝas, kaj samtempe socia kohero por paco fortiĝas;
- tiel la novaj komunikrimedoj helpas konstrui pontojn inter la popoloj, kaj la tendenco al bariloj kaj polusiĝo malfortiĝos.

REZOLUCIO DE LA 58-A KONGRESO DE ILEI

Ĉeftemo: Lingvolernado kaj Artefarita Intelektio

La 58-a Internacia Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kunveninta en Beogrado (Serbio) de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025, dediĉis sian semajnon al la temo **"Lingvolernado kaj Artefarita Intelektio"**. Kadre de la kongreso okazis ankaŭ universitata ILEI-Simpozio sub la titolo **"AI kaj Kulturo"**.

Konsiderante ke:

- Artefarita intelekto (AI) rapide transformas la metodojn de lingvolernado kaj instruado, kunportante novajn eblecojn kaj defiojn;
- Esperanto, kiel planlingvo kun logika kaj regula strukturo, havas unikajn trajtojn kiuj povas bone kongrui kun AI-iloj por lernado kaj tradukado;
- Estas esence esplori kiel AI povas subteni kaj plibonigi la instruadon kaj disvastigon de Esperanto, samtempe konservante la kulturajn kaj interhomajn aspektojn de lingvolernado;
- La simpozio "AI kaj Kulturo" emfazis la gravecon de etikaj, sociaj kaj kulturaj konsideroj en la apliko de AI, ankaŭ en la kunteksto de tradukado kaj arta kreado;

La Internacia Kongreso de ILEI rezolucias:

- **Subteni esploradon kaj evoluon de AI-rimedo por Esperanto:** Instigi la evoluon de aplikaĵoj/apoj, platformoj kaj rimedoj bazitaj sur AI (ekz. babilrobotoj, virtualaj instruistoj, gramatikanaliziloj kaj progresintaj neŭraj tradukiloj) por faciligi la lernadon, ekzercadon kaj uzadon de Esperanto.
- **Enkonduki AI en metodikon por instruado de Esperanto:** Esplori kaj kundividi bonajn praktikojn por la uzo de AI en lernado kaj instruado de Esperanto, rigardante ĝin kiel komplementan, ne anstataŭantan, al la homa interago kaj tradicia pedagogio.
- **Krei lernomaterialojn utiligantajn AI-teknologion:** Disvolvi kaj disvastigi novigajn edukrimedojn kiuj enplektas AI-teknologion por fari la lernadon de Esperanto pli interaktiva, tajlorita kaj efika.
- **Sentemigi onin pri etika kaj respondeca uzo de AI:** Stimuli kritikan pensadon pri la efikoj de AI en lingvolernado kaj kulturo, certigante ĝian uzon inkluzivan, justan kaj respektan al lingva kaj kultura diverseco.
- **Flegi kunlaboron inter esperantistoj kaj AI-fakuloj:** Instigi la interŝanĝon de scioj kaj spertoj inter la esperantista komunumo, esploristoj, akademianoj kaj programistoj en la kampo de artefarita intelekto, por utiligi la sinergion inter Esperanto kaj novaj teknologioj.
- **Apogi la trejnadon de instruistoj pri AI:** Proponi daŭrajn trejnadojn por instruistoj de Esperanto, por ke ili povu efike kompreni kaj uzi AI-rimedojn en sia instruado.

Anoncoj

Rezultoj de la ĉi-jara balotado

Results of this year's election

Nia balotadperiodo oficiale finiĝis dum la Dulanda Kongreso en Toronto, kaj tie anonciĝis la elektitaj membroj de la estraro, kiuj servos 3-jaran deĵoron ĝis 2028. La rezultoj de la balotiloj estas jenaj:

Our election period officially ended during our Binational Conference in Toronto, and our new board members were announced, who will serve a 3-year term until 2028. The results of the election are as follows:

Por sekretario / For secretary:

- Charlotte “Ĉaro” BURTON - Gajnis (142 el 151 voĉdonoj, 94%) / Won

Por direktoroj (2) / For directors (2):

- Kinen CARVALA - Elektiĝis (95 el 151 voĉdonoj, 63%) / Won
- Izaak ZAWYRUCHA-MOORE - Elektiĝis (92 el 151 voĉdonoj, 61%) / Won
- Bradford “Bradfordo” SMITH - Ne elektiĝis (81 el 151 voĉdonoj, 54%) / Lost

Ankaŭ la proponita ŝanĝo al nia statuto aprobiĝis (138 jeso, 12 neoj, 1 sindeteno el 151 voĉdonoj). Refreŝigu vian memoron pri la detaloj en *Usona Esperantisto* **2025:1** (ekde paĝo 27).

*The proposed change to our bylaws also passed, (138 in favor, 12 against, 1 abstain, of 151 votes). Refresh your memory on the details in American Esperantist **2025:1** (starting on page 27).*

Esperanto-USA elkore dankas al niaj kandidatoj pro ilia volonteco servi, kaj ankaŭ al Ruth “Margo” KEVESH-COHEN kaj Fred MEYER, kiuj ĵus finis sian deĵoron en la estraro, pro ties helpo kaj agado tra la jaroj!

Esperanto-USA wants to thank our candidates for their willingness to serve, and also Margo “Ruth” Kevess-Cohen and Fred Meyer, the outgoing board members, for their help and activity through the years!

Centvorte nun haveblas

La nova libro *Centvorte*, anoncita kaj recenzita en la antaŭa numero de *UE*, nun haveblas! Ĝi estas aĉetebla de Amazon. Sekvas plua, konciza recenzo de Preston FIRESTONE, kiun la redakcio ricevis post la kongreso en Toronto, kie debutis kaj tuj elĉerpiĝis la libro.

Centvorte, verkita de Jorge Rafael “Rafa” NOGUERAS kaj eldonita de Mondial, estas la unua libro de la ĵus elektita akademiano, kaj konsistas el cent centvortaj mikronoveloj, aldone al diverse longaj noveloj jam eldonitaj sed kiuj kolektiĝas por la unua fojo en tiu ĉi novelaro.



Rafa lerte kaj bonguste stiras la lingvon, kaj la noveloj mem estas precize formitaj kvazaŭ gemoj. Strukturo, kaj la noveloj kaj la mikronoveloj intrigas glate kaj bonproporcie. Skribadi mikronovelojn limigitajn de netuŝebla ĉirkaŭlimo, ke ĉiu mikronovelo ampleksu ekzakte cent vortojn, kreskigis kaj kultivis en la verkinto la emon al precizo kaj koncizo. Ĉiuj vortoj kaj frazoj akordas unu kun la aliaj por krei tekstojn sen superfluaĵoj.

Temojn de kreskado, perdita infaneco, kaj griziĝo de la ĉiutaga vivo plektis Rafa tra la paĝojn de la novelaro. La intrigoj gracie elturniĝas per gimnastikaj surprizoj, kiujn relegado montras antaŭe semitaj subtile ekde la komenco mem de la rakonto. Enŝlositaj korpoj, post-bombaj kaŝejoj, ferocaj gentomurdoj, kaj kadukaj menskapabloj miksiĝas kun ĉie reganta melankolio, kies plej plena esprimo estas la glimoj de ĝojo, sindono, kaj amo kiuj amarsukere fulmetas ĉe la pintoj de la rakontoj.

La libro mem fortikas: malgraŭ tio, ke ĉi tiu recenzanto likigis akvon sur la libron, ĝi neniel cedis nek disfalis. La kovrilon ornamas arto de Ana Lobo CARVALHO, kies bildojn la legonto ankaŭ trovos dissemiĝintaj inter la paĝoj de la libro, ĉarme ilustrantajn plurajn el la noveloj.

Mi bonkore konsilas tiun ĉi libron al tiuj, kiujn interesas fikcio, kiu trafas la veron per ŝercoj, kaj kies scivolemon spronas tio, kio estas stranga, malcerta, aŭ eksterkutime: jen plezuregiga legaĵo por vi.

Nogueras, Jorge Rafael. *Centvorte*. 196 paĝoj. Mondial, Nov-Jorko, 2025. ISBN 978-15-9569-507-9.

Stela atingo en nia firmamento

La tre apreziata kontribuanto al la Dulanda Kongreso en Toronto Stela BESENYEI-MERGER, Esperantisto de la Jaro por 2024, ricevis ankaŭ eksterordinaran movadan premion, donitan “pro ŝiaj originalaj, inspiritaj kaj plurflankaj kontribuoj al la organiza kaj kultura vivo de la Eo-movado.” La Premio Maertens fondiĝis en 2024 por honori Grégoire MAERTENS, eksa prezidanto de UEA, je lia centjariĝo, kaj aljuĝiĝis unue al Stela, la 1-an de Januaro, 2025, la 101-an naskiĝdatrevenon de Maertens, honora membro de UEA. La premio aljuĝiĝas ne nur pro jamaj kontribuoj al la movado, sed aparte pro la estontaj atingoj kiujn oni antaŭvidas de la premiito. Stela, denaska parolanto, en 2011 komencis sian regulan Esperanto-blogon, Stela Ĉiam Nur Kritikas, kiu plu aktivas. Jam antaŭ tiam Stela multe laboris kontribue al la organizado de diversaj E-aranĝoj, kaj de 2017 ŝi konsilas kaj trejnas E-organizantojn per sia podkast-serio La Bona Renkontiĝo. En 2021, ŝi lanĉis la interretan komunumon Bobelarto, kiu kuraĝigas kaj subtenas verkadon kaj legadon de esperanta literaturo. Ŝi okupiĝas freŝdate pri la feminisma podkasto Radikala Tenero, kaj pri sia nova blogo Stela Havas Opinion Pri La Mondo. Se ankaŭ vi, kiel la aljuĝantoj de la Premio Maertens, atendas de Stela eksterordinarajn estontajn projektojn por la bono de Esperantujo, eblas subteni ŝin per Substack, kaj per Liberapay. Liberapay estas plurlingva (kaj esperantlingva) retejo por poioma donacado al kreantoj kies laboron vi volas daŭrigi. La platformo priskribas sin jene: “desegnita por provizi stabilan amasfinancitan bazan enspezon al kreantoj, ebligante ilin daŭre fari la laboregon, kiu profitas al ĉiuj.”



Nekrologo de Arlyn KERR

Kun peza koro mi sciigas vin pri la forpaso de mia kara edzino Arlyn. Ŝi estis dumviva membro de E-USA. Jen ŝia nekrologo.
—Les

Arlyn Kerr, 80, passed away on June 23, 2025. She died peacefully at home. She was preceded in death by her daughter Julie. She is survived by her husband of 58 years, Les Kerr; son David Kerr of Seattle; daughter-in-law Merissa Goldstein; grandchildren Natalie/Nell and Allison; and her brother Howard Meisner.



Arlyn was born March 8, 1945 in Jersey City, New Jersey. She received a degree in mathematics from Douglass College (Rutgers University) in 1966. She did graduate work in computer science at Cornell University, where she met her husband-to-be, Les.

Arlyn moved to the Seattle area in 1970. She was a computer programmer/analyst for IBM and the City of Bellevue, retiring in 1994.

Arlyn was a longtime volunteer for the Fred Hutchinson Cancer Research Center, where she supported bone marrow transplant patients and their families, many of them coming to Seattle from abroad. Arlyn was a Camp Fire leader, and volunteered with school district committees, Group Health Community Volunteers, Community Services for the Blind, and Friends of the Library.

Arlyn and Les shared a keen interest in the international language Esperanto, which they first learned in 1985. They attended four international conferences, and made two extended trips to Europe as ‘senior nomads’, going from one Esperanto meeting to another and staying with Esperanto speakers in a dozen countries as they traveled from city to city.

Arlyn and Les enjoyed kayaking for many years. They lived part-time aboard a houseboat and owned a 28’ trawler which they used extensively for cruising throughout the Salish Sea.

Arlyn was a founding member of the Tuesday Trekkers, a women’s hiking group that recently celebrated its 33rd anniversary. Arlyn’s interests included vegan cooking and baking (she was vegan for 27 years), pickleball, secular humanism, quilting, and board games. Arlyn was a voracious reader and a big library supporter. She loved doing crossword puzzles (several each day), jigsaw puzzles, and word games. She was a fan of UW women’s softball and volleyball.

Remembrances may be made to FareStart <farestart.org>.

La 111-a UK okazos en 2026 — en Graz, Aŭstrio!

Por la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) la Estraro de UEA elektis Aŭstrion kiel kongreslandon. La bela *Graz* (Graco) estos la kongresurbo.

Ĝia nomo devenas de la slovena vorto *Gradec*, kiu signifas “kasteleto”. Kun pli ol 900 jaroj de ekzisto, en 2003 *Graz* estis la Eŭropa Kultura Ĉefurbo. Ĝi estas listigita kiel Monda Heredaĵo de Unesko kaj Urbo de Dezajno, proponante al vizitantoj fascinan mikson de tradicio kaj novigado. Pro sia eventoplena jarkalendaro, turismaj vizitindaĵoj kaj larĝa oferto de notinda gastronomio diverseco ĝi ankaŭ estas konata kiel la Ĉefurbo de Ĝojo.

La Esperanto-klubo de *Graz* estas inter la plej aktivaj de Eŭropo. En 2023 aperis oficiala 42-paĝa gvidilo de la urbo en Esperanto. Tiu gvidilo estas internacie senpage mendebla ĉe la Turisma Oficejo de la regiono *Graz*, pri kio raportis UEA.facila.

Entute vigla kaj turisma urbo, kun unika strukturo por vizitantoj kaj tradicia kaj aktuala Esperanto-movado.

Juna Instruisto de la Jaro

Alekso MILLER ricevis Honoran Atestilon de ILEI en la konkurso Juna Instruisto de la Jaro! La ĵurianoj aljuĝis premiojn en la konkurso rilate al reguleco en Esperanto-instruado, aktivaj instrumentoj, novigaj aliroj al instruado, historia kaj kultura konigado de Esperanto, internacia kunlaborado, kreemo de instrumaterialoj, kaj longdaŭraj pozitivaj rezultoj. Gratulon al li!

Vikipedio atingis 375 000 artikolojn

La esperanta vikipedio atingis 375 000 artikolojn!

Vi (jes, vi) povas kontribui al la vikio jam morgaŭ, jen kurso. <kursoj.esperanto.wiki/bazoj-de-vikipedio>

Se vi preferas lerni per teksto, jen manlibro. <kursoj.esperanto.wiki/manlibro-pri-vikipedio>

Sukcesintoj pri la KER-ekzamenoj el Usono

- B1 - Skriba: Brandon DOWNS, Sarah LI
- B1 - Kompleksa: Cory BENDER, Danjela SCHMIDT
- B2 - Kompleksa: Ognian Hristov KABRANOV, Alison WITHONEL
- C1 - Parola: Amanda HIGLEY SCHMIDT
- C1 - Kompleksa: Vincent ALLISON, Theodore DUBOIS
- C2 - Kompleksa: S. Alexandro SATO, Brandon SOWERS

Entute, Usonon reprezentis la plej granda nombro de sukcesintoj. Ĉiu ekzameno ricevas laŭgrade sian kvanton da poentoj, kaj usonaj esperantistoj arigis entute 47 poentojn ĉi-jare, dum Kanado, Francujo, kaj Hispanujo ricevis 23, 22, kaj 21 respektive. La du usonaj sukcesintoj pri la kompleksa C2-ekzameno konsistigis kune duonon el la tuta sukcesintaro pri tiu ekzameno ĉi-jare. Nur unu alian fojon, en 2017, Usono ricevis la plej grandan kvanton da poentoj kaj sukcesigis la plej multnombrajn kandidatojn.

Por tiu ĉi jaro, usonano S. Alexandro SATO ricevis la premion *La plej bona reganto de Esperanto* por la plej granda poentaro inter konkursantaj kandidatoj por la kompleksa C2-ekzameno, kun 119,6 poentoj entute. Brandon SOWERS ricevis la trian plej grandan poentaron, kun 107,8 poentoj. Ĉiujare nur po unu konkursanto en lando povas ricevi premion en la konkurso, sed Brandon ricevis apartan mencion en la gratulanonco pri la konkurso de Fernando MAIA Jr, la prezidanto de UEA, kaj Katalin KOVÁTS, la estro de la KER-Ekzamena Centro, ke dua usonano tiom elstare rangis.

Usonanoj rikoltis multajn premiojn en la Belartaj Konkursoj por 2025

Kaj Rafa NOGUERAS kaj Debra HAMEL ricevis egale unuan premion en la Branĉo Prozo

Steven CYBULSKI ricevis unuan premion pri Mikronovelo

Debra ricevis trian premion pri Mikronovelo

Rafa ricevis unuan premion pri Originala Teatraĵo

Esperanto-USA Gift Acceptance Policy

Purpose:

Esperanto-USA (“the Organization”) solicits and accepts charitable gifts that support and further its mission to advance education in and awareness of Esperanto in the United States. This policy guides donors, volunteers, staff, and board members in evaluating, accepting, or declining gifts and ensures that acceptance decisions protect the Organization’s integrity, financial health, and reputation.

Policy:

1. Scope

This policy applies to all forms of gifts — including cash, securities, tangible and intangible property, and planned-giving instruments — offered to Esperanto-USA for any purpose, program, or service.

2. Definition of Major Gift

A *major gift* triggers formal review and is defined as **(a)** any cash or marketable security valued at **\$10,000 or greater**, or **(b)** any proposed *non-monetary* asset of any value (e.g., real estate, tangible personal property, intellectual property). Gifts described in (b) are **not ordinarily accepted** and will be processed in accordance with §3 and §7.

3. Gifts Generally Accepted Without Review

1. **Cash & Cash Equivalents** – including checks, ACH, credit/debit cards.
2. **Marketable Securities (Publicly Traded)** – transferred to the Organization’s designated brokerage account and generally liquidated upon receipt.
3. **Bequests & Beneficiary Designations** – via wills, revocable trusts, life-insurance policies, commercial annuities, and retirement plans.
4. **Charitable Remainder & Lead Trusts** – where Esperanto-USA is a named beneficiary only.

4. Gifts Not Accepted

Esperanto-USA will decline any proposed gift that:

1. Consists of restricted, closely held, or otherwise illiquid securities (no exceptions) (example: privately

held securities. Donor must convert to cash prior to donating);

2. Names Esperanto-USA as a trustee or fiduciary — **except where the Organization is already a named beneficiary or administrator of a pre-established trust (e.g., the Harmon Reed Trust)**;
3. Cryptocurrency or other digital tokens;
4. Non-marketable, speculative, or heavily encumbered assets;
5. Obliges the Organization to assume financial, environmental, or other liabilities;
6. Mineral Rights
7. Presents a potential conflict of interest;
8. Involves real property or other assets subject to environmental or regulatory concerns (no exceptions);
9. Violates the Organization’s Articles of Incorporation or jeopardizes its 501(c)(3) status;
10. Is incompatible with its mission, values, or strategic priorities;
11. Creates an undue financial, administrative, legal, or reputational burden;
12. Imposes restrictions that prevent prudent management or use;
13. Gifts conditioned on extremist, discriminatory, or otherwise unethical purposes; or
14. Is otherwise unlawful or unethical.

5. Gifts Requiring Finance Committee Review

Asset Type	Key Review Considerations
Tangible Personal Property (books, equipment, artwork, vehicles)	Mission relevance, marketability, carrying costs, clear title/provenance
Life-Insurance Policies (where Organization is owner/beneficiary)	Premium obligations, policy type, surrender value
Planned/Estate Gifts naming Esperanto-USA as trustee	Administrative burden, legal compliance, investment oversight

Intellectual Property and Royalties	Legal complexity, valuation, ongoing management
Endowment or Restricted Gifts ≥ \$10,000	Alignment with §8 time limits, investment management, reporting requirements

6. Gift Acceptance Process

1. **Initial Screening** – Treasurer or designated staff logs the offer and determines whether it falls under §4 or §5.
2. **Due Diligence** – For §5 gifts, staff gathers required documentation (appraisals, insurance or policy documents, trust or legal agreements, intellectual-property assignments) and submits a summary to the FC.
3. **Committee Recommendation** – The FC records its analysis and recommendation (accept, modify, or decline).
4. **Board Action** – When required, the Board votes on the gift at the next regular or special meeting, or may conduct an expedited virtual vote in accordance with Board operating rules when timing is critical.
5. **Gift Agreement** – For major or restricted gifts, Esperanto-USA and the donor must memorialize — via a mutually agreed-upon email or a signed document — an agreement outlining purpose, restrictions, liquidation intent, reporting schedule, and the five-year sunset clause. The finalized email or document will reside in the Organization’s official electronic storage system until all conditions of the gift have lapsed.

7. Review & Approval Authority

1. **Treasurer/Executive Director** – may immediately accept gifts listed in §3.
2. **Finance Committee (FC)** – reviews gifts listed in §5 and recommends acceptance, modification, or declination to the Board.
3. **Board of Directors** – retains final authority for gifts exceeding \$250,000, gifts that significantly impact strategy, or any gift the FC refers for further consideration.

8. Default Time-Limited Endowment & Restricted Funds Clause

Unless the Board explicitly approves an alternative, **all endowment-style and other restricted gifts will convert to unrestricted status after five (5) years** from the date of gift acceptance. Donors may request a longer or perpetual restriction, but such requests require Finance Committee review and Board approval.

When a restriction sunset — or if a donor-imposed condition later proves impracticable — the Board will make a *good-faith effort* to honor the donor’s original intent by moving the funds to the closest mission-aligned **category-level purpose** (e.g., an Education/Scholarship endowment may be redesignated to Education/General Support). If no substantially similar purpose exists, the Board reserves the right to repurpose the funds to meet the Organization’s most pressing needs while remaining consistent with its charitable mission.

9. Donor Responsibilities

1. Donors bear responsibility for obtaining independent tax or legal advice and for all required appraisals.
 - a. Required appraisals include obtaining the fair market value of the gifts if requiring a gift receipt for tax reporting.
2. Esperanto-USA does not provide tax, legal, or investment advice.

10. Valuation & Acknowledgment

1. Gifts are recorded at fair market value on the date of transfer.
2. Donors are responsible for providing and defending the fair market value at time of transfer.
3. The Organization issues written acknowledgments compliant with IRS regulations (e.g., for gifts ≥ \$250) within **30 days** of acceptance.

11. Policy Review & Transparency

This policy will be reviewed at least every **three (3) years** by the Finance Committee and updated as needed. The current version will be posted on the Organization’s website for transparency.

Asocio Nova Familio: Orfejo Klara Zamenhof en Goma

Kara leganto de *Usona Esperantisto*,

Asocio Nova Familio kaj ĝia Orfejo Klara Zamenhof tre ege bezonas nian subtenon, eĉ pli nun pro la milito en Goma en la Demokratia Respubliko Kongo. Bedaŭrinde, apenaŭ iuj ajn usonanoj regule donacas al ANF, kaj mi ne scias kial pli da homoj ne decidis helpi.

Eble oni ne scias pri ANF. Mi esperas ke tiu ĉi rekta peto de Betti MAUL, kun informo pri tio, kiom granda estas la bezono, helpos vin decidi agi kiel patrono, ke orfo iru al lernejo.

Se vi povos subteni orfon en Goma, aŭ se vi havas demandojn, kontaktu min. Ĉar mi jam agas kiel donacpetanto por ESF, mia rolo por ANF estas nur ricevi kaj plusendi aliajn mondonacojn kun la miaj, kaj meti homojn en kontakton kun respondeculoj pri ANF. Ni ne povas meti iliajn nomojn nek kontaktinformojn en la bultenon nun pro la danĝeraj kondiĉoj en Goma. Estas malfacile trovi manierojn sendi monon al Afriko, kaj estas eĉ pli malfacile sendi monon al Goma en la DRK! Sed mi ĉiam sukcesas malkovri novan manieron sendi la monon.

Betti Maul delonge rolas kiel monpetanto por ANF en Germanujo. Ni serĉas la homon, kiu povos tion organizi por Usono.

Elkore,

Chuck Mays

Unu el la lokoj en kiuj esperantistoj plej multnombros, estas en milito. Orienta Kongolando, pro historiaj vundoj kaj naturaj resursoj estas centro de ŝajne senfina malpaco. Koltano, oro, kaj aliaj konfliktmineraloj estas pribatalataj kaj tio ĉefe okazas en Goma.

La ideo de Esperanto, lukti por monda paco kaj homa interkompreno estas profunde alloga por homoj ĉie en la mondo. Estas rimarkinde, ke ideo, kiu naskiĝis en la kapo de unu homo, trovas sekvantojn same en Nepalo, Novjorko, kaj Kongolando, kun vasta malsameco inter socia tavolo, eduknivelo, kaj deveno de la homoj, kiuj parolas ĝin. En la okcidenta mondo, Esperanto eble estas simpla ŝatokupo por multaj, maniero por ekkoni interesajn homojn; kaj en Kongolando same lernas ĝin tiuj homoj, kiuj scivolemas pri la mondo.

Tamen, ili verŝajne lernis Esperanton ankaŭ pro alia forta deziro: Laŭ statistiko de DKEJO (Demokratia Kongolanda Esperanta Junulara Organizo), 75% de junaj kongolandaj esperantistoj loĝas en urboj tuŝitaj de milito. Por ili, paco havas apartan signifon. Multaj el ili fuĝis al la granda urbo Goma, kiu estas trafata de ondoj de milito ekde pli ol 30 jaroj kaj nun estas sub la administrado de ribeluloj. Oficiale la batalo estas pri la historio de la ruanda genocido, sed malantaŭ la kurteno resursoj kiel oro kaj koltano determinas la konflikton. Koltano estas grava mineralo por ebligi verdajn teknologiojn; ĝi troviĝas en komputiloj, telefonoj, kameraoj, kaj elektraĵoj aŭtoj. Oni povas vidi tian riĉecon tamen plejparte nur trans la landlimo en Ruando.



En Goma, tuj trans la landlimo, la situacio estas alia — ĉi tie militistoj ĉirkaŭis longe kaj kaptis antaŭ iom da tempo la tutan urbon, kaj minacas la popolon diktatorece. Muzikisto, kiu verkis kantojn kontraŭ la militistoj, estis murdita, infanoj estas kidnaptataj por iĝi militistoj, kaj virinoj kaj infanoj aparte riskas esti perfortataj dum ĉi tiu tempo. Krome, ekde nelonge, la nova administracio ekpostulas impostojn de ĉiu ajn: laŭ raporto de lokano, ĉiu butikisto, ŝuisto, meblofaristo, panisto, fotostudio kaj vendisto devas pagi. Malfido kaj nekompreneco inter la homoj kreskas, samkiel la ŝuldoj de ĉiuj. Por multaj homoj, la ĉiutaga vivo iĝis simpla defio, kiel trovi monon por aĉeti



farunon por ne malsati, specife por orfoj, kiuj ne plu havas familion por subteni ilin.

Malgraŭ ĉio, estas meze de tiu mizero ankaŭ veraj bonkoruloj. Familioj kun dek personoj, kiuj decidas preni unu infanon pli por permesi al orfo loĝi sub tegmento. Estas esperantistoj kiuj fervore verkas kantojn kaj instruas la lingvon pro forta kredo je paco kaj pli bona mondo. Sinjoro E... estis unu el tiuj fervoraj esperantistoj, kiam li rimarkis, ke pli kaj pli da georfoj volas partopreni en la kursoj. Tial, li kun aliaj entreprenis projekton por pli bone prizorgi tiujn infanojn kaj kreigis de tio organizaĵo nomita "Asocio Nova Familio" (ANF). En la granda kaoso kaj ĉeesto de timo, kiu regas en la regiono, tio, kion oni atingas por tiuj infanoj, havas des pli da bona efiko sur la socion, ĉar la sufero kiun la infanoj evitas, ili ne pludonos, sed la espero kiun ili spertas, ili pludonos. La minimuma nivelo de homa digno kiun oni provizas al ili jam havas pozitivan

Karaj samideanoj,

Post kiam la redakcio ricevis tiun ĉi leteron de Betti MAUL, mi individue starigis kontakton kun sinjoro E..., kaj intertempe povis ricevi pliajn informojn de li pri ANF, kiuj rilatas aparte al la klopodoj enskribi infanojn por la nuna lernojararo. ANF prizorgas ĉi jare 215 infanojn, kun la prioritatoj ke la infanoj manĝu, estu sanaj, kaj ricevu bonan edukadon. Neniam ĝis nun eblis atingi ĉiujn celojn — kaj la organizo arigas al si ŝuldojn dum ili provas sendi laŭeble multajn infanojn al la lernejo dum la jaroj. Ekde 2022, la organizo sukcesis regule malpliigi siajn ŝuldojn pri la lernejaj kostoj, sed ĉi-jare pro pli granda financa premo kiun Betti priskribis, la ŝuldoj denove kreskis. Kvankam la lernejaj ŝuldoj malhelpas ke la infanoj entute enskribiĝu, tiuj ŝuldoj notende falis, kiam multaj infanoj bedaŭrinde estis forpeltitaj el la lernejo pro nepagipovo — Tamen por ke kelkaj infanoj trapasu siajn ekzamenojn restas 2 800 \$ pagendaj.

La infanoj kiuj ne sendiĝos al la lernejo facile iĝos stratinfanoj. ANF ankoraŭ ne havas sufiĉan monon por manĝigi kaj dormigi la infanojn. Iuj infanoj malsaniĝas pro malpura akvo, manko da nutreroj, eĉ malsekuraj kondiĉoj. En siaj gastfamilioj, iuj infanoj dormas en hundodomo aŭ kokinodomo kaj kelkaj eĉ veneniĝis de serpento dum ili dormis. Pli ol deko nun loĝas kun organizanto pro manko de sufiĉa subteno. Jam forpasas la komenca monato de la lernojararo en Goma, kaj la organizantoj de ANF ne scias, kiom multe pli de la lernojararo pasos antaŭ ol ili ricevos sufiĉan financan subtenon por enskribi eĉ iujn el la infanoj. Dum la semajnfinoj ANF okazigas Esperanto-lecionojn, sed la infanoj ĉeestu la lernejon regule por havi sukcesan vivon.

efikon por la estonteco, sed la fakto ke eĉ kelkaj el ili povu iri al lernejo ebligas rompi la ciklon de malriĉeco kaj malpaco. Disdonado de vestaĵoj, lernomaterialoj, sapo, kaj manĝaĵoj al homoj kiuj vere bezonas tion povas fakte ŝanĝi la mondon iomete, danke al la donacoj kiujn la infanoj ricevas de esperantistoj kiel vi, de ĉirkaŭ la mondo.

Dum la 7-a de Junio okazis ekzemple, dum eta germana renkontiĝo, donackurado #KuriPorKONGO, kiu subtenas la agadon de s-ro E... kaj de la infanoj. Ili sukcesis kolekti monon por sendi unu infanon al lernejo dum unu jaro, do ĉirkaŭ 350 \$, kaj eĉ restis iom da mono por aliaj infanoj. Tio estas bona ekzemplo, ke eĉ dum malgranda renkontiĝo, se ĉiu kontribuas laŭ sia kapablo, oni povas multe helpi aliajn. Do ni petas vin, laŭ via kapablo, helpi al orfo en Goma kaj iĝi patrono de infano, kiu ne plu havas gepatrojn.

Kaj se vi legis la artikolon ĝis ĉi tie, la aktivuloj de la Asocio Nova Familio sincere dankas al vi! Kune ni uzu Esperanton por ĝia kerna celo: por krei pacon!

Por ekscii pli pri la agado de ANF, kaj la bezonoj de la infanoj, vi povas rigardi bildpresentaĵon kun multaj fotoj ĉi tie: <mallonge.net/UE-2025-3-ANF>

Por fari donacojn al ANF vi povas turni vin al s-ro Chuck MAYS. Kontaktu lin ĉe Charles.o.mays@gmail.com — li plusendos donacojn al ANF.

Grandan antaŭdankon pro via helpo!

Nome de la Asocio Nova Familio,

Betti Maul, sekretariino

Por plenumi ĉiujn bezonojn, certe pli grandaj sponsoroj bezonatas — firmaoj kaj fondaĵoj (eĉ ne-esperantaj). Ĉu iuj el vi, karaj legantoj, havas kontaktojn en via vivo kun organizaĵo, fondaĵo, firmao, aŭ preĝejo kiu povus fari signifoplenan kontribuon al la plibonigo de la vivo de georfoj kiuj travivas la militon en Goma?

Intertempe, ni ĉiuj povu pensi, pri kio fareblas je individua, familia, aŭ kluba skalo. Mi kun miaj gepatroj decidis kune agi kiel patrona familio por sendi unu infanon al la lernejo ĉi jare. Ĉu vi kun viaj familianoj povus fari same? Kio pri via E-klubo — ĉu ĝi povus kune financi kelkajn infanojn regule, ke tiuj restu en la lernejo, ne spertu la danĝerojn de strat-vivo, havu pli bonan vivon, kaj kontribuu al pli bona estonto por la socio ĉirkaŭ si?

Ĉu *Usona Esperantisto* havas legantojn kiuj povus trejni E-klubojn pri monkollektado por tia ĉi kaj aliaj indaj bonfar-oportunoj? Certe estus valora lerto por ĉiu klubo, scipovi monkollekti por projektoj laŭ si sponsorindaj en kaj ekster Esperantujo.

Kiom kostas por sendi infanon al la lernejo, dependas de la aĝo de la infano.

- Ĉe la bazlernejo, kostas po 130 \$ en jaro por infano.
- Ĉe la mezlernejo, kostas po 275 \$.
- Ĉe la universitato, kostas po 600 \$.

Ankaŭ pri la aĉeto de lernomaterialoj, tio dependas de la aĝo kaj nivelo.

- Ĉe la bazlernejo unu kompleto por jaro = 45 \$ (sako, kajeroj, krajonoj, ŝuoj, uniformo aŭ lerneja vestaĵo ktp).
- Ĉe la mezlernejo = 50 \$ (kiel supre).
- Ĉe la universitato = 30 \$ (sako, ŝuoj, paperoj).

En Kongo, la registaro pagas neniun parton de la edukado, la gepatroj devas pagi tion, kio lasas georfojn dependaj je la bonfaro da aliaj. Krome, tie universitato ne temas pri aldona opcio, sed deviga parto de la edukado. Manko de universitata edukiĝo ne disigas tiel nomatajn “blank-kolumnajn” dungitojn de “blu-kolumnaj” dungitoj, sed simple distingas dungitojn de senlaboruloj.

Alena Adler

2025 K2 Financa ĝisdatigo

de la kasisto • Matt Brooks

En la dua kvaronjaro (K2), Esperanto-USA efektivigis planitajn programajn elpagojn, stabiligis sian financosistemon kaj konservis bonan likvidecon, samtempe preparante la Dulan dan Kongreson kun niaj samideanoj en Kanado. La rakonto de K2 temas ĉefe pri altempigo: restriktitaj rimedoj estis elpagitaj al programoj laŭ la plano, kaj ni financis planitajn programajn kaj operaciajn elspezojn per estrare aprobita spezo el la konto de nelimititaj investoj, dum la Fonduso restis stabila.

Noto: Rezultoj de la Reed Trust estas montrataj por travidebleco sed **ne estas inkluzivitaj** en la sumo de E-USA.

Saldoj de kontoj

Ĉekkonto & kreditkarto

Konto	Fino de K1 (31 Mar)	Fino de K2 (30 Jun)	Ŝanĝo
Ĉekkonto	27 201 \$	54 624 \$	+27 423 \$
Kreditkarto	46 \$	2 990 \$*	+2 944 \$

*La kreditkarta sumo venas el la periodo finiĝinta je 7 **Julio** (kovras malfru-juniajn spezojn).


Investoj

Merkataj valoroj laŭ periodfino

Konto	Fino de K1 (31 Mar)	Fino de K2 (30 Jun)	Ŝanĝo
Fondusoj	282 468 \$	283 839 \$	+1 371 \$
Nelimititaj investoj	314 348 \$	273 319 \$	-41 029 \$
Sumo de E-USA-kontoj	596 816 \$	557 158 \$	-39 658 \$
Reed Trust (aparta ento)	408 614 \$	419 043 \$	+10 429 \$

Kio ŝanĝiĝis?

- La **Fondusoj** restis stabilaj — enspezo el fikso-enspezoj havaĵoj kompensis etan merkatan ŝanĝigon.
- La **Nelimititaj investoj** malkreskis ĉefe pro **de la estraro aprobita spezo de 50 000 \$ al la ĉekkonto** dum Junio; merkata rendimento parte kompensis la eltiraĵon.
- Tiu transigo ĉefe konsistis el la **enspezo de la Reed Trust por 2024** (provizore tenita en altintereza monmerkata konto ĝis planita uzo) por subteni la **Nord-Amerikan Sumeran Kursaron (NASK) en Toronto: 14 400 \$**.
- La ceteraj **35 600 \$** estis transdonitaj por kovri planitajn programajn elspezojn laŭ la buĝeto, inkluzive eldonojn ligitajn al la kongreso, kies enspezoj envenos en K3.
- Reed Trust** daŭre kreskis kaj faris la planitajn elpagojn (90% al ricevantoj; 10% por administrado). Memor: **Reed Trust ne estas posedaĵo de E-USA** kaj ne eniras la sumon supre.



K2 Elstaraj punktoj (etato de agadoj)

- Limigitaj programaj elpagoj** (inkluzive trapasigon el Reed Trust kaj stipendiojn) efektivigitaj laŭ plano, kio produktis atenditan kvaronjaran deficiton.
- Kernaj administraj kostoj** (salajroj, lupago, programaro) restis laŭ la plano.
- Likvideco** restis forta malgraŭ programaj pagoj kaj la transigo por subteni operaciojn.

Libroservo – fokuso de K2

- **Vendoj (katalogo/libroservo):** 919 \$
- **Membrekotizoj / novaj membrecoj:** 2 781 \$
- **Kosto de venditaj varoj (KDVV):** 0 \$ (pro uzo de tute amortizita aŭ donacita stoko)

La libroservo daŭre servas membrojn kaj generas marĝenon. Esperanto-USA krome ricevis plurajn proponojn de donacoj de libroj, kio helpas plifortigi vendojn en estontaj kvaronjaroj. Krome la organizaĵo esploras var-ideojn vendotajn per LaBazaro.com, esperantisto-posedata kaj -administrata retejo.

Farotaj agoj por la kasisto

- **Kunlabori kun *Morgan Stanley*** por transdoni la nelimigitajn investojn kaj la *Reed Trust* sub aktivan administradon.
- **Kunlabori kun la profesia kontisto de Esperanto-USA** por krei novan, klaran kaj modernan kontoplanon, kongruigitan kun nuntempaj neprofitcelaj praktikoj. Tio simpligos la preparadon de la Formulario 990 de la IRS.
- **Kunlabori kun la profesia kontisto** por starigi novan programon nomatan “Kulturo / Ĝenerala”, kiu estos la ombrela programo por la **Usona Bona Film-Festivalo (UBFF)** kaj por estontaj

verkokonkursoj kaj aliaj kultur-specifaj programoj (vidu “Rigardante antaŭen” sube).

- **Verki skizon kaj kunlabori kun la estraro** por aprobi novan **Politikon pri akcepto de donacoj**, kiu spegulas nuntempajn plej bonajn praktikojn kaj la rekomendojn de **CalNonprofits**.

Rigardante antaŭen

Dum la ĉi-jara kongreso Danielle POWER, la vidvino de la forpasinta Karlo Pov, proponis starigi **limigitan donacon je 50 000 \$** en lia nomo. La donaco subtenos la **UBFF** same kiel literaturajn kaj eldonajn projektojn, precipe verkojn de originalaj kaj tradukitaj sciencfikciaj rakontoj en Esperanto. Karlo estis pasia leganto de sciencfikcio kaj tradukisto de bildstrioj. Ni lastatempe finlaboris la donac-interkonsenton kun Danielle kaj kun ĝojo honoros Karlon, delongan kaj fortan subtenanton de Esperanto en Usono. Ni krome ĝojas anonci, ke — dank’ al la sukcesoj de Esperanto-USA dum la pasinta jaro kaj al la fido de la komunumo je nia estraro kaj strategia direkto — la delongtempa honora dumviva membro **Humphrey TONKIN** decidis **plene pagi por dumviva membreco**. Tiu tre malavara gesto de Humphrey, kune kun liaj kaj aliaj reagoj dum la **aferkunsido** de E-USA ĉe la kongreso, varmigas niajn korojn kaj donas al ni plian instigon por daŭre plenumi la mision kaj vizon de Esperanto en Usono.

Esplorante la lingvon de financoj, parto 3

de la kasisto • Matt BROOKS

Ni ĝojas prezenti la trian parton de nia serio pri financaj fakvortoj. En parto 1 ni enkondukis la fundamentajn terminojn, kaj en parto 2 ni montris ilian uzadon per dialogo inter la kasisto kaj la prezidanto de la estraro. Nun ni proponas novajn terminojn per ekzemplo de praktika konversacio inter la kasisto kaj la direktoro de la Centra Oficejo, dum ili preparas la kvaronjaran finanĉan raporton kaj planas administrajn elspezojn. La suba ekzemplo estas nur lernilo kaj ne vera konversacio.

Direktoro kaj kasisto laboras manenmane: La direktoro provizas al la kasisto decidajn informojn pri planitaj elspezoj kaj strategiaj celoj. Ri krome administras ĉiutage enspezojn kaj elspezojn de la organizaĵo. La kasisto certigas precizajn kontajn kodojn, koherigas la raportadon kaj konsilas al la direktoro pri finandecidoj. Tiel ili kune garantias klaran, fidindan kaj efikan finanĉan administradon.

Jen la dialogo!

Direktoro: Saluton! Jen la lastaj fakturoj pri oficejaj elspezoj. Ĉu vi volas kontroli ilin antaŭ ol mi enmetos ilin en *QuickBooks*?

Kasisto: Kompreneble. Mi certigos, ke ĉiu fakturo havu ĝustan **kontan kodon** laŭ nia **kontoplano**. Tio garantias koherecon en niaj financaj raportoj.

Direktoro: Mi rimarkis, ke iuj elspezoj pri oficeja materialo devus esti atribuitaj al **administraj kostoj**, sed unu fakturo pri presado de materialoj por la nova programo ŝajnas **programa elspezo**. Ĉu tion mi devas tiel klasifiki?

Kasisto: Jes. Se la elspezo rilatas rekte al la programaj agadoj, ĝi devas esti registrita kiel **program-rilata elspezo**. Nur ĝeneralaj kostoj — ekzemple softvaraj licencoj aŭ telefonaj kostoj — iras sub **administrado**.

Direktoro: Ni ricevis monsumon de tiu tre donacema paro, kiu petis, ke la donaco subtenu edukadajn agadojn aŭ projektojn. Ĉu mi ĝin marku kiel **limigitan enspezon**?

Kasisto: Jes, ĉar ĝi venas kun specifaj kondiĉoj: Ĝi devas esti uzata laŭ la postuloj de la donacinto. Male, **nelimigita enspezo** estas libera por la propraj bezonoj de la organizo.

Direktoro: Fine, pri la kvaronjara **amortizado** de la komputilaro — ĉu vi jam enmetis ĝin?

Kasisto: Jes. Ĝi aperas sub **nemonaj kostoj** en la raporto. Amortizado ne estas tuja elspezo, sed montras detalan perdon de valoro de longdaŭraj aktivoj dum tempo.

Enkonduko de novaj terminoj

- **Kontoplano** (Chart of accounts): la strukturo por organizi kontojn laŭ speco.
- **Konta kodo** (Account code): la unika kodo atribuita al specifa konto por ĝusta klasifiko.
- **Administrataj kostoj** (Administrative costs): elspezoj por teni la organizon funkcia (oficejaj elspezoj, salajroj, serviloj).
- **Programaj elspezoj** (Program expenses): kostoj rekte ligitaj al misiaj aŭ programaj agadoj.
- **Limigita enspezo** (Restricted income): enspezo kun kondiĉoj, kiu devas uziĝi laŭ la postuloj de la donacinto.

- **Nelimigita enspezo** (Unrestricted income): enspezo sen specifaj postuloj aŭ kondiĉoj pri elspezoj.
- **Amortizado** (Depreciation): laŭgrada perdo de valoro de longdaŭraj aktivoj, ekzemple komputiloj. (Amortizado en Esperanto rilatas al kaj fizikaj valoraĵoj kaj nefizikaj valoraĵoj, dum la angla uzas du vortojn, *depreciation* kaj *amortization*.)
- **Nemonaj kostoj** (Non-cash costs): kelkaj aferoj estas registritaj por kontado, ekzemple amortizado, kie mono fakte ne interŝanĝiĝas aŭ uziĝas.

Ĉi tiuj terminoj estas esencaj por kompreni la internan finanĉan agadon de neprofitcela organizo kiel Esperanto-USA.

Ni plene esperas, ke vi ĝuas ĉi tiun serion kaj trovas ĝin informriĉa! Se vi deziras pliajn klarigojn aŭ pripensas alian terminon, bonvolu kontakti nin ĉe kasisto@esperanto-usa.org. La kvara parto aperos en la venonta numero de *UE*, sed vi povas tuj legi ĝin ĉe la ĉefa retejo de E-USA! <<https://mallonge.net/E-USA-financoj-4>>

Estrar-kunsidoj, Jun-Jul

de la estraro

Por konservi spacon, la bulteno inkluzivas nur la protokol-resumon. Plenaj protokoloj (inkluzive de diskutoj) estas haveblaj ĉe la ĉefretejo de E-USA <esperanto-usa.org/en/category/meeting-minutes/>.

June 2025

Neniuj voĉdonoj de la estraro.

July 2025

Propono: Ke Esperanto-USA akceptu novan deklaron de valoroj, post ŝanĝoj, kiujn membroj proponis:

Esperanto-USA fosters friendly ties among its members, local communities, and the broader Esperanto movement by listening to and empowering its members, prioritizing their needs, and acting professionally to advance our mission.

Esperanto-USA nutras amikajn ligojn inter siaj membroj, lokaj komunumoj, kaj la pli vasta Esperanto-komunumo pere de la aŭskultado kaj apogado de siaj membroj, prioritatigo de iliaj bezonoj, kaj pere de maniero profesia por antaŭenigi nian mision.

Unuanime aprobite de la ĉeestaj estraranoj kaj membroj.

Propono: Ke Esperanto-USA provizore akceptu la Manifeston de Toronto, kondiĉe, ke la kongreso akceptos, kaj, ke kelkaj ŝanĝoj estos akceptitaj. Unuanime aprobita.

Krucvortenigmo: *Senteme*

enigmoj • Kartero WILLIAMS


Jen nova vortkrucenigmo je 9×9 danke al Kartero WILLIAMS! Inter la solvintoj ni lotumos rabaton je 10 \$ de la retbutiko. La redakcio akceptas solvojn ĝis **20 Novembro** al la adreso bulteno@esperanto-usa.org. Vi rajtas plenumi la enigmon rete ĉe *Amuse Labs* <<https://mallonge.net/UE-2025-3-enigmo>>, tamen solvoj devas esti senditaj rekte al la redakcio.

Horizontale

1. Fremda animo estas _____ sen limo
7. Unge serĉis
10. Speciala teĥnik'
11. Afrik-brazila danceca batalart'
12. Angela biero
13. Insul' aŭ solid' laŭ uskleco
16. Anagramo de 11-Horizontala kaj loko por lasi aŭton
20. Hidrogenon
22. Kie ni ĝenerale estas
23. Kontinua subten'

Vertikale

1. Sovaĝa porko
2. Pugne
3. Tiaj, kiaj broso, aleno kaj forko
4. Indiko de ekscito en la okuloj
5. Impres'
6. Medoluj'
7. Pro specialiĝo
8. Lakteca juvelŝton'
9. Televida serio kun multaj dramaj klifpendaj finoj
14. Kien oni metas aĵon
15. Kiel balaas nova balailo
17. Profunda korsent'
18. Manipula
19. Ĉel' trovita en medusoj, maranemonoj, kaj koralo
20. Kontraŭ-kredebla
21. Dentokovril'



Atentu! La solvo por la antaŭnumera krucvortenigmo,
Hans-Paulige, troviĝas sur la sekva paĝo.

Solvo: Hans-Paulige el № 2025:2

enigmo-solvoj

Dankon kaj laŭrojn al Rafa NOGUERAS, kies solvo, ĉi-foje la sola sendita al la redakcio, estis ĝusta! Pro tio, li ricevas dek-dolaran retbutik-rabaton.

			1	V	2	A	3	R	4	A	5	D	6	E	7	R					8	I	9	A	10	M	11	A				
			12	S	I	M	I	L	E	T	I									13	E	S	T	I	M	14	U					
		15	S	U	B	A	Ĉ	E	T	A	D					16	E	S	T	O	N	I	N	O							17	
18	V	I	R	U	S	A			19	A	V	I			20	O	L	E	O	M	A	K	U	L	O						21	
22	A	M	A	R	E			23	O	L	I	G	A	R	K				25	A	C	E	T	O	N							
26	T	I	O	N			27	G	R	A	V	A	P	L	O	R	O			29			30	I	M	A	G	E				
							31	K	R	E	P				32	S	I	V	E	R		33	T			34	A	G	A	C		
35	S	36	K	37	L	38	A	V	A			39	L	40	A	41	T	A		42	A	K	N	U	43	L		44	A	S	O	
45	K	R	E	T	A	N				46	A	V	A	R			47	S	T	A	T	U	R									
49	V	I	V	O	R	D				50	N	E	P	O	V				52	M	A	M	U	T	53	I	D				55	
56	A	M	I	N	D	A				57	O	N	I			58	A	R	Ĉ			61	M	I	S	I	L	A				
62	R	E	L	I	E			63	F	E				64	R	A	D	I	I				66	E	G	U	M	E	N			
							67	O	K	U	L	E	N			70	S	I	T	U				71	M	I	L	I	T	O		
72	M	73	D	74	R			75	A	T	A	K	E			76	P	S	I	O				77	B	L	O	G	O	J		
78	E	R	E	T				80	O	N	U	F	R	I					82	K	E	R	O									
84	K	I	T	I	N			85			86	D	O	L	O	R	A	87	88	K	A	L	O			89	S	E	Ĝ	O		92
93	A	N	U	R	O	J					94				95	A	L	I	K	A	Z	E			96	D	A	T	I	V		
97	S	K	R	I	B	A	P	E	T	O						100	T	R	E				101	P	U	N	A	D	O			
		102	I	N	T	E	R	A	G	A							103	I	D	I	O	L	E	K	T	O						
			105	I	A	L	E	Ĝ	O									106	V	E	R	K	I	N	T	O						
							107	J	O	G	O								108	E	L	I	R	E	J	O						

Kongresaj raportoj

Enirejo al Esperantujo

El la postbaznivela kurso

kongresaj raportoj • Anne SCHILL

Kiam mi aliĝis por la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), mi estis en egalaj partoj ravita kaj terurita. Ĝis tiu punkto, mi neniam parolis en Esperanto kun alia persono. La lingvo estis malstreĉa ŝatokupo por mi, malkovrita dum esploro pri konstruitaj lingvoj kaj posta aŭskultado de esperanta muziko. Mi sekvis kurson de *Duolingo* jen kaj jen, ĝis unu tagon mi decidis, ke mi volas vere lerni la lingvon kaj fariĝi aktiva en la komunumo. Tiel, NASK estis la evidenta solvo, ĉu ne? Krom kiam mi unue eniris la ĉefan vestiblon de *Toronto Metropolitan University* post mia flugo al Toronto por ricevi mian nomŝildon, la ĉambro plena de parolantoj kun (ŝajne, al mi) perfekta facileco pensigis min: mi faris eraron.

La rapidaj frazoj de Esperanto fluis ĉirkaŭ mi, belaj tamen nedeĉifreblaj. Mi povis lukti tra kelkaj frazoj kun kelkaj aliaj ĉeestantoj, sed mi eksentis, kiel limigitaj estis miaj kapabloj. Dum mi instaliĝis en mian ĉambron por la semajno, mi zorgis pri la kursoj, kiuj komenciĝos la sekvan tagon. Mi estus en la plej malalta nivelo el la tri, sed ĉu mi sufiĉus?

Mi alvenis al la klasĉambro iom frue. La kurso, instruita de Karina OLIVEIRA, estis en unu de la komunaj ĉambroj sur la dua etaĝo de la konstruaĵo. Mi elektis unu sidlokon proksime al fenestro dum aliaj studentoj alvenis. Lernantoj plenigis la malplenajn spacojn de la tabloj kaj ni ekkonatiĝis.

La kurso komenciĝis, kaj mi tuj sentis min trankviligita vidi, ke miaj afablaj kunstudantoj ŝajnis esti de simila nivelo de kapablo; ni parolis malrapide kaj ofte ni devis serĉi vortojn en la vortaro. Sed la pasio por la lingvo kaj la komuna deziro pliboniĝi estis tie fortaj. La kurso, por postkomencantoj, havis fokuson pri aŭskultado kaj parolado. Ni aŭskultis multajn videojn de esperantistoj de ĉirkaŭ la mondo kun malsamaj akĉentoj, kaj transskribis iliajn frazojn. Ni ludis ludojn, kiel “Kiu estas mi?” kie ni havis la nomon de fama persono al niaj fruntoj kaj ni devis

demandi aliulojn por diveni ĝin. Ni ofte diskutis temojn kun niaj samklasanoj. Je la fino de la semajno, ni donis mallongajn prezentojn pri niaj hobiaj.

Estis krome sufiĉe da gramatika revizio por certigi, ke ĉiu havu fortan bazan scion. Ekzemple, unu tagon ni reviziis ĉirkaŭ 40 malsamajn prefiksojn kaj afiksojn, kiuj estas oftaj en Esperanto. Informo pri aliaj vortoj estis en niaj klasmaterialoj, organizita laŭ partoj, kiel antaŭpartoj (ki-, ti-, ĉi-, neni-, ktp), postpartoj (-u, -o, -a, e, ktp), KI-vortoj (kio, kiu, kiel, ktp), aŭ TI-vortoj (tio, tiel, ktp).

Por mi, la merga stilo estis la plej helpa aspekto de la programo. Ĝi devigis min efektive paroli en plenaj pensoj, anstataŭ nur ekzerci min pri fulmkartoj ĉiutage. Unu supervalora kapablo, pri kiu mi ekzerciĝis per mergado, estis trovi alternativajn manierojn priskribi aferojn, kiam mi ne sciis la precizan vortprovizon. Estis malfacile komence, sed mia Esperanto pliboniĝis rapidege per ĉi tio. Dum la semajno, la sola fojo, kiam mi parolis en la angla (krom kiam mi pridemandis la esperantan vorton por angla vorto), estis kiam mi telefonis al mia familio dufoje. Dum la telefonvokoj, la angla sentiĝis strange en mia buŝo.

La finan nokton, post NASK kaj la Dulanda Kongreso, mi vespermanĝis kun alia esperantisto, kun kiu mi amikiĝis dum la kurso. Ĉe taja manĝo, ni pridiskutis iom da ĉio: niaj spertoj de la semajno, la kulturo de Esperanto, la bezono de pliaj esperantaj artaĵoj, estontaj planoj por la lingvo, familio, videoludoj, religio, urboj, amikoj. Ĉio, mi konsciis, kion mi volus preparoli en la angla. En nur ok tagoj, mi transiris de luktado kompreni simplajn demandojn, al esprimado de miaj pensoj simple sed pli-malpli libere. Kompreneble, mi ankoraŭ havas longan vojon por trairi en mia lernado de Esperanto. Sed mi certas, ke mia sperto dum NASK estis la plej bona vojo pliboniĝi kaj mi esperas ĉeesti venontjare.

Ateliero harmonia

El la altnivela kurso

kongresaj raportoj • Bill MAXEY

La ĉi-jara altnivela kurso, gvidata de Rafa NOGUERAS, kiu en Toronto debutigis sian kolekton de centvortaj mikronoveloj, montris sin vera unikaĵo. En antaŭaj jaroj instruis ĉe NASK aŭtoroj Trevor STEELE, Spomenka ŠTIMEC, Anna LÖWENSTEIN, István ERTL kaj aliaj, kiuj foje kuraĝigis verkadon sed neniam efektive esploris la procezon kun siaj lernantoj. Ili plej ofte prezentis literaturaĵojn, kune kun traktado de tikla gramatiko, vortproviza pliriĉigo kaj kulturaj temoj, same kiel aliaj instruistoj ĉe tiu nivelo. Tiaj kursoj fakte aparte plaĉis al mi, kiu amas la literaturon sed neniam sentis fortan deziron mem verki. Do mi aliris la kurson de Rafa iom skeptike sed certa ke mi trovos ion kontentigan en ĝi.

“Venu kaj konstatu, ke ni ĉiuj kapablas verki mikronovelon!” promesis la priskribo. Kaj tion ni ja konstatis. La kurso efektive tre similis al mikronovelo mem: mallonga, lerte strukturita kaj enhavanta nur bazajn elementojn senpene kompreneblajn. La produktado de pliaj ekzemploj de tiu nuntempe furora ĝenro — ĉefe de la centvorta formo — troviĝis klare kaj sole en la fokuso.

Ni trovis nin en vigla ateliero kies serio de aktivaĵoj glate progresis laŭgrade je komforta ritmo, ĉiuj taŭge interligitaj. Bazaj klarigoj pri celoj kaj teknikoj, sen multaj detaloj, kondukis al taskoj kun specifaj sed ne rigidaj postuloj. Okazis sinsekvaj rondoj de instruado, verkado kaj prezentado. Neniu tasko ripetiĝis; intervenis nek reviziado nek polurado. Ĉiam novaj aliroj al la temo kaptis la atenton.

Niaj unuaj verkprovoj baziĝis sur tekstoj de Rafa kaj Clelia CONTERNO GUGLIELMINETTI, kiujn ni plurmaniere aliigis laŭ instrukcioj. Poste ni elektis el kelkaj tre elvokivaj frazoj proponitaj por komenci aŭ fini propre ellaborotan verketon. Sekve ni kreis tute originalan intrigon surbaze de unu el ok fascinaj homaj fotoportretoj. Foje la vortlimo estis cent; foje libera. Oni krome traktis la plej konvenan rilaton inter verkanto kaj revizianto, kaj tiurilataj ekzercoj postulis kunlaboradon inter du homoj. La lastan tagon oni dediĉis ĉefe al diskutado pri la lingvo mem, aparte la rolo de neologismoj (laŭ tekstoj de Jorge CAMACHO kaj Anna LÖWENSTEIN).

La klason konsistigis pli ol 25 homoj (ĉiuj usonanoj krom po unu de Brazilo, Hungarujo, Indonezio, Japanujo kaj Kanado) kaj inkludis eĉ kelkajn konatajn aŭtorojn. Dum la

tuta unua sesio ĉiu klasano laŭvice konigis sin lude, asertante tri aferojn (du verajn, unu ne) pri si kaj defiante la aliajn diveni la mensogon. Nur je la fino, samefike kiel frapfrazo en mikronovelo, oni subite konstatis ke ne temis nur pri amuzaĵo. Laŭ Rafa, “Tiu, kiu povas konvinki aliajn, ke mensogo estas vera, ja kapablas verki sukcesan mikronovelon.” Tiu ludado ankaŭ establis la agrablan amikecan etoson kiu regis dum la tuta kurso.

Ni aktive partoprenis ne nur per plenumado de la taskoj sed ankaŭ per la voĉlegado de la tekstoj utiligitaj en la kurso (rondire) kaj de niaj propraj verkprovoj (laŭvole). Preskaŭ ĉiuj (sed ne mi!) tiel prezentis — fiere kaj sen-time! — almenaŭ unu el siaj noveletoj iam en la semajno. Tio bele montris la diversajn interpretadojn de la taskoj kaj tre ofte amuzis. (La eblo konigi propran laboraĵon al la kunklasanoj efektive maloftas en la altnivelaj kursoj kaj do aparte kontentigas.) Ĉiuj sentis la apogon kaj de la kunuloj kaj de Rafa mem kaj ne hezitis starigi demandojn aŭ — foje iom pikmoke — interŝanĝi komentojn.

Por ni, kiuj bonŝancis sperti ĝin, la kurso restas memorinda ne nur pro sia enhavo, sed ankaŭ pro la harmonia kaj kunlabora etoso. Ĉiu lernanto povis prosperi kaj senti sin integra parto de speciala grupo kun aparte simpatia gvidanto. Inspirataj kaj instigitaj, ni forportis de la kurso — krom la specialaj memoraĵoj — ĉion necesan por komenci verki propravole.

Indas substreki la gravecon de la trajtoj de Rafa mem en la sukcesa disvolviĝo de la kurso. Sindediĉa kaj ĉiel kuraĝiga, li kondukis la aferojn absolute humile, sen ajna spuro de supereco. Li ne klopodis amuzi per propra ŝercemo sed lasis tion al la tekstoj (de Raymond SCHWARTZ, Louis BEAUCAIRE kaj D. K. JORDAN) kaj la studentaj kontribuadoj, kiujn li tre evidente ĝuis.

La reklamado por la kurso entuziasme invitis: “Ni legu, verku kaj amuziĝu per Esperanto.” Tion ni ja faris. Sed — kredeble esceptokaze — mi mem, eĉ malgraŭ tiel bonega kurso, ankoraŭ ne havas emon krei fikciaĵojn (kaj do verkas raportojn, kiel tiu ĉi). Tamen, se mia rilato kun la muzo ŝanĝiĝos, mi certe scias kie kaj kiel komenci la laboron — dank’ al Rafa Nogueras kaj miaj kunkursanoj en Toronto.

Miaj spertoj kiel instruisto ĉe NASK

El la instruistaro

kongresaj raportoj • Jorge Rafael NOGUERAS

NASK (la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto) estas jam kvazaŭ mia dua hejmo en Esperantujo. Dum tuta semajno, usonaj (kaj eĉ alilandaj) esperantistoj renkontiĝas en iu loko (lastatempe, plej ofte en Raleigh, Norda Karolino) por lerni Esperanton, paroli Esperanton, kaj simple vivi kune en tutesperanta etoso. Ĝi estas kie mi ĉiujare renkontas kelkajn el miaj plej karaj amikoj, kaj mi apenaŭ povas imagi miajn somerojn sen ĝi.

Mi partoprenis NASK kelkajn jarojn kiel lernanto, kaj poste oni invitis min veni kiel trejn-instruisto. Tiun jaron mi ĉeestis la kursojn de la tiujaraj instruistoj: Thomas ALEXANDER en la postbaza nivelo, Katalin KOVÁTS en la meza nivelo, kaj Anna LÖWENSTEIN en la supera nivelo. Mi observis iliajn instru-metodojn, helpis pri korektado de hejmtaskoj, kaj eĉ preparis kaj gvidis diskut-sesion pri la romano “Kiel akvo de l’ rivero” de Raymond SCHWARTZ.

En postaj jaroj mi instruis unue retan pretigan kurson, kaj poste la mezan nivelon du sinsekvajn jarojn. Estas kaj avantaĝoj kaj malfacilaĵoj pri la instruado de la meza nivelo: unuflanke, estas mirinde povi konstati la pliboniĝon de la lingvonivelo de la lernantoj post nura semajno; aliflanke, estas malfacile krei la instruplanon, ĉar ĝi multe dependos de la dekomencaj lingvoniveloj de la lernantoj, kaj tion oni povas bone taksu nur surloke. Krome, estas multaj NASK-anoj kiuj ĉeestas jaron post jaro, do oni devas pensi pri ili, kaj klopodi trovi diversajn instru-temojn kaj aktivizaĵojn.

Kiam oni proponis al mi instrui la superan nivelon — specife, kurson pri verkado de mikronoveloj — mi dekomence hezitis. Dum miaj jaroj kiel lernanto, la superan nivelon instruis tre kleraj kaj famaj movadanoj: krom la jam menciitaj Katalin KOVÁTS kaj Anna LÖWENSTEIN, ankaŭ Bertilo WENNERGREN, István ERTL, José Antonio VERGARA, Tim OWEN kaj Duncan CHARTERS, kun kiuj mi apenaŭ povus konkuri, aparte kiel relative lastatempa esperantisto. Tamen, la ideo okazigi verk-atelieron dum NASK vere allogis min, ĉar io tia vere estus alloginta min kiel lernanton. Tial mi jesis al la propono kaj alfrontis la defion.

En la unua tago mi prelegetis pri mikronoveloj kiel ĝenro kaj la ecoj de bonaj mikronoveloj, kaj montris ekzemplojn de tre mallongaj mikronoveloj. En la dua tago mi instruis pri tio, kial gravas peti konsilojn kaj provlegadon de aliuloj, kaj kiel esti bona provleganto kaj kritikanto de aliulaj verkoj. En la lasta, sesa tago ni diskutis la temon de “bonlingvismo” kaj “mavlingvismo”, kaj kiel tio gravas al ni kiel verkistoj.

Ĉefe, tamen, la kurso baziĝis sur legado kaj verkado. Prepare al la kurso, mi multe legis (kaj relegis!) mikronovelojn kaj novelojn por ĉerpi el ili interesajn verkojn taŭgajn por miaj celoj. Por ĉiu el ili mi unue prezentis la aŭtoron al la klaso; poste ni legis la verkon grupe; ni diskutis la intrigon kaj eventualajn lingvajn aŭ gramatikajn interesaĵojn; kaj fine mi proponis verk-ekzercon iel bazitan sur la ĵusa legaĵo. Fine, la lernantoj provlegis la verkon de sia najbaro, kaj poste ĉiu havis la eblon laŭtlegi sian verkon al la samklasanoj.

La malfacileco de la verkotaskoj progresis de la unua tago ĝis la lasta tago: la unua verk-ekzerco konsistis el malplilongigo de mikronovelo (por igi ĝin centvortaĵo); poste ni reverkis novelon kiel mikronovelon; kaj jam en la fino, surbaze de fotoj de eblaj roluloj, la lernantoj devis mem elpensi intrigon kaj verki tutan rakonton.

Feliĉigis min la fakto, ke la lernantoj volonte partoprenis la diskutojn, kaj ke, sen multe da instigo miaflanke, la plejparto el ili volonte legis siajn elpensitaĵojn. Mi krome estas tre kontenta pri la kvalito de la verkoj: multaj el ili estis fakte elstaraj, kaj mi eĉ kuraĝigis la lernantojn konkursigi siajn verkojn en unu el la diversaj literaturaj konkursoj en Esperantujo.

Estis por mi tre kontentiga kaj amuza sperto instrui tiun kurson pri verkado dum NASK. Mi kredas, ke la lernantoj ĝuis la sperton (eĉ se ili neniam verkis antaŭe), kaj mi esperas, ke almenaŭ iuj el ili daŭrigos sian verkadon. Kiu scias? Eble unu el ili iĝos konata verkisto en Esperantujo! Jen la belo de instruado: oni neniam scias, kiajn bonajn fruktojn oni rikoltos post la semado.

Poŝkomputiloj kaj klasĉambroj

El la arĥivo

kongresaj raportoj (el la arĥivo)• Paul GUBBINS

Artikolo de Paul GUBBINS el *Monato*, originale presita en numero 2015/11. *Usona Esperantisto* represas ĉi tiun artikolon laŭ ties permeso inter la aliaj ĉi-numeraj NASK-raportoj, honorante Paul koincide kun lia morto la 6-an de Aŭgusto, 2016.

Dum la somero mi ĝuis la privilegion instrui Esperanton (jam la kvaran fojon) ĉe la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) ĉi jaron okazigita en Nord-Karolino. Se vi ankoraŭ ne spertis ĉi tiun intensan, ok-tagan kurson (kun aŭ sen mi!), mi ĝin rekomendas. Alia pluso: ĝi kunligiĝas kun Kino-Teatro-Festivalo (KTF) – stimula kaj krea evento.

Sed, momenton. Jam aŭdiĝas plendoj. Ĉu MONATO ne fanfaronas esti peresperanta, ne priesperanta revuo? Kial, diable, aboni (aŭ pruntepreni), se mi povas legi la samon en primovada revuo?

Paciencon, mi petas. Evidente la ĉefredaktoro de MONATO tre bone scias, kian revuon li ĉefredaktas. Ĉu ne ĉiun matenon, antaŭ ol matenmanĝi, mi ripetadas la mantron “peresperanta, ne priesperanta”?

Tamen gravas la esperanta, nord-amerika fono. Ĉar, instruante en Nord-Karolino, mi spertis unuafoje la ... kion? ... povon? utilon? konkurencon? tiranecon? de la enklasĉambra poŝkomputilo.

“Poŝkomputilo”. Oni parolas pri “saĝtelefono”, pri “poŝtelefono”, sed ĝenerale ĝi uzatas ne telefone sed komputile. Krome “saĝa” ĝi ne estas: nur homoj ĝin saĝigas aŭ, miaokaze, pro nelerto, ĝin malsaĝigas.

Evidente, ĉe la universitato, kie mi instruas en Britio, la studentoj enĉambrigas diversspecajn komputilojn. Malgraŭ malfortaj, malsukcesaj provoj, ne eblas malpermesi elektronikajn aparatojn. Registritaj estas 15% de la studentoj (la nombro jaron post jaro kreskas) kiel psike aŭ korpe handikapitaj. Oftas disleksio, sed ne nur: aŭtismo aŭ sindromo Asperger notindas. Do pro medicinaj kialoj multaj nepre uzu komputilojn.

Krome raportas studentoj, ke ili preferas fari dumprelegajn notojn komputile, ne mane. Malofte ili manskribas, sed ofte komputilas. Apenaŭ imageblas la vekioj pri dolorantaj manoj, kiam studentoj dum du-hora ekzameno devis skribi mane. Nur bierskatolojn ili tenas, ne skribilojn.

Sed, kaj jen la diferenco inter mia kutima brita sperto kaj mia nekutima nord-amerika, miaj universitataj studentoj

ankoraŭ ne uzas siajn komputilojn por kontroli, kion mi diras. Jes, ili skribas siajn notojn, jes ili kaŝe, subtable, tekstas, pepas, fejsbukas ... tiel ke, ilin vidante, mi fojfoje demandas min, kiel fakte ili subtable okupas siajn fingrojn.

Tamen ĝis nun ili neniam, mi ripetas, neniam, levis la manon por interveni per freŝaj faktoj, korektitaj konoj, tuj ĉerpitaj el Interreto.

Aliflanke la spertaj, engaĝitaj esperantistoj, kun kiuj mi plezure kunlaboris ĉe NASK, pli avangarde, pli saĝe, aplikis siajn poŝkomputilojn. Kiam vorto diskutendis, jen tuja PIV-difino; kiam romano-titolo, dato serĉendis, jen tuja informo; eĉ, kiam mi fuŝis statistikojn, tuj ekvibris la komputileto en mia poŝo – iu, kiel mi poste konstatis, tre diplomatie kaj ne publike, sendis la ciferojn, kiujn mi vane provis eltiri el mia kompatinda, neelektronika menso.

Jen, por mi, nova kaj, sincere, iom timiga spertaĵo. Inter amikoj, inter esperantistoj, mi povas pli facile akcepti tion, kaj danki pro la riĉigo de la klasĉambra interŝanĝo de ideoj. Ekster la esperanta klasĉambro, tamen, ekzemple kun miaj kutimaj studentoj, mi ne tiom certas.

Dum 40 jaroj en diversaj instruejoj mi kutimis – ĉu bone, ĉu malbone – suvereni. Nepras, aparte en lernejoj, eventuale malpli en universitatoj, ke instruatoj fidu instruantojn. Se malaperas tiu ĉi fido, se lernantoj ekopinias, ke danke al poŝkomputilo ili subite pli scias ol la pedagogo, aŭ – terure! – malice plagas tiun per kromaj kaj aldonaj scioj, riskas kolapsi la klasĉambra disciplino.

Mi vidis la klasĉambran estontecon, kaj mi ne scias, ĉu ĝi plaĉas. Intelekte mi scias, ke necesas brakumi progreson, ke enestas en dumleciono poŝkomputilo-uzo multo aprobinda. Sed emocie ... jen io alia. Cedi lokon al poŝkomputilo, almenaŭ kun ĝi konkurenci ... prefere, ne.

Jen defio por nova instruisto-generacio: kiel primajstri ĉi tiun klasĉambran koboldon. Defio verŝajne ne por mi. Pli kaj pli mi sentas min pelata al la pordo de la emeritiĝo. Ne tuj, kvazaŭ sendata poŝkomputila mesaĝo, sed baldaŭ.

Kion mi spertis ĉe mia unua kongreso

kongresaj raportoj • Jakobo STERLING

Eble vi estas kiel mi — persono, kiu kredas je la ideoj de Esperanto, kiu ofte penas paroli kun personoj, sed nur rete — malĉeesta estas ĝis nun la plej bona maniero por vi. Mi spertis la riĉan kulturon rete; ni havas belajn kantojn, poemojn, librojn, kaj multajn manierojn de esprimo. Tamen, mi volis fizike sperti Esperantujojn. Mi ne volis aŭdi Esperanton nur rete, nur inter mi kaj aliaj personoj en Diskordo kaj aliaj retaj formoj de babilado. Mi esperis eniri la lokon kaj tuj aŭdi la bruon de babilado en Esperanto, vidi esperantajn vortojn kaj afiŝojn sur la muroj. Mi revis pri la momento, kiam mi povus simple alpaŝi al iu kaj diri: “Saluton!” — ne kun konfuzo, sed kun varmece.

Nu, ĝuste tiel okazis mia sperto. Mi vojaĝis per buso al Toronto, kaj post multaj horoj de vojaĝo kaj multaj haltoj mi fine alvenis en Toronto. Kiam mi enpaŝis en la hotelon, mi estis salutita de la bruoj de esperanta babilado. Esperantlingvaj afiŝoj sur la muroj kaj tabloj, kiuj parolis pri la spertoj de la NASK-partoprenantoj, kaj ankaŭ la estontecaj spertoj de la kongresanoj. La etoso estis eleganta kaj plena je kapturita ekscito. Mi tuj kaptis la plej gravan eron de la vespero: personoj kiuj ne ofte vidas aliajn nun renkontiĝas. La varmece en la aero estis palpebla. Ŝajnis al mi kvazaŭ familio renkontiĝas por Kristnasko aŭ aliaj festotagoj — dum mia unua vespero mi eĉ vidis multajn larmojn de ĝojo.

La sekvan tagon la kongreso vere komenciĝis. La programo estis dividita inter tri ĉambroj, ĉiu kun propraj temoj, kaj la partoprenantoj povis libere elekti kie ĉeesti. En unu ĉambro oni ludis ludojn, en alia oni spektis filmojn, kaj en la tria okazis prelegoj kaj prezentoj. La prezentoj, kiujn mi ĉeestis, montris al mi la vastan mondon de Esperanto. Jen nur kelkaj el la spertoj, kiuj aparte restis en mia memoro.

Unue, mi tre ŝatis la prelegon de Amanda SCHMIDT (nia direktoro!). Ŝi rakontis pri sia sperto denaskigi siajn filinojn. Tio reflektis multajn punktojn en la movado: la rekonadon de Esperanto en Usono el inter aliaj lingvoj, kaj ankaŭ la fakton ke homoj en Esperantujo sentas sin kiel granda elektita familio. Tiun senton mi rimarkis dum la tuta kongreso, kiu ja estis aranĝo inter Usono kaj Kanado. Mi vidis ankaŭ la specialajn fakgrupojn en E-USA. Ŝajnas al mi, ke ekzistas grupo por preskaŭ ĉiuj! Ekzemple, estis GLAT-grupo, ŝak-grupo, grupo de vegetaranoj, kaj grupo por radio-amatoroj — kaj se ne ekzistas grupo por via intereso, vi ĉiam povas krei ĝin. En tiu unua tago mi jam renkontis multajn homojn, kiujn mi esperas revidi en la estonteco — saluton al Luko kaj Majero!

La tago finiĝis per la Arta Vespero, dum kiu partoprenantoj prezentis siajn talentojn. Mi ankoraŭ varme memoras la kanton de Luko, kiun li lernis de sia familio kaj tradukis en Esperanton. Aliaj partoprenantoj laŭtleĝis famajn verkojn, poemojn, aŭ simple tion, kion ili plej amis el nia movado.

Dimanĉo alvenis. Matene mi helpis Jeremie SABIYUMA dum lia prezento pri la orientafrika kulturo. Mi jam sciis iomete pri la temo, sed estis tre interesa sperto, kaj multaj ĉeestantoj spektis ĝin kun granda intereso. La tago estis plena je prelegoj kaj ludoj. Tio, kion ni havas en la movado, kaj kion ni bezonas por la movado, ŝajnis la plej gravaj temoj.

La kongreso finiĝis per granda festa vespero. Tie, ĉiuj streĉis la kruojn post longa sidado kaj dancis! Ni festis la fakton, ke ni kune formas Esperantujojn — per dancado, per kantoj, kaj ĝenerale per la ĝojo esti kune. Nun mi povas diri kun certeco: esperantistoj vere scias kiel festi!

Mi finos per tio ĉi: la ĉeesta sperto de Esperanto — Esperantujo mem — antaŭe estis mistero por mi, sed nun ke mi finfine gustumis ĝin, mi amas ĝin profunde. Antaŭ la kongreso mi konis la lingvon nur per ekranoj — retbabilejoj, Diskordo, Jutubo, ktp. Mi ofte demandis, “Ĉu en la reala vivo Esperanto havas la saman varmecon?” Post la semajnfino mi povas diri sendube — jes ja. Ni havas multajn belegajn homojn, kiuj donas al la movado siajn tempon, koron, kaj ŝvitlaboron. Ĉiu renkontiĝo, rideto, kaj nova amikeco montris al mi, ke Esperanto ja estas pli ol nur lingvo. Ĝi temas pri viva komunumo. Mi nun esperas aldoni mian propran kontribuon al Esperantujo, kaj lasi mian spuron. La kongreso montris al mi, ke nia estonteco estas brila.

Tial, mi petegas vin, karan leganton: provu partopreni, se vi havas la eblecon. Ĉu per kongreso, loka klubo, retbabilado, ĉiuj gravas. Babilu multe kaj ofte, ĉar kiam ni kolektiĝas, kiam ni uziĝas la lingvon kun ĝojo, ni vere sentas la forton de tio, kion Zamenhof imagis antaŭ pli ol jarcento. Kaj nun, post mia unua kongreso, mi scias en la koro: tio estas movado inda je nia amo kaj lingvo inda je nia voĉo.

Neologismoj de DLK

kongresaj raportoj • Teodoro "Jan Tepo" DUBOIS

En Toronto mi venis al mia unua esperanta kongreso, ĉeestante kaj NASK kaj la DLK. Unu afero kiu surprizis min estis tio, kiom da neologismoj aperis efektive dum la kongreso kaj kursaro. Iuj estis dummomentaj ŝercoj, iuj ŝajnis pli utilaj aŭ daŭripovaj. Jen almenaŭ tiuj, kiujn mi plej ŝatas. Kaj pri kelkaj, dum mia sekva esperantumado en Eŭropo, la sorto ofertis al mi aliajn eble pli bonajn ideojn, kiujn mi notas kiel postscion. (Ĉu vi povas elparoli “postscio” dekfoje rapide?)

publo: Drinkejo, laŭ la angla tradicio. *Ni kunvenu ĉe la publo.*

Ĝi aperis tuj post kiam iu afiŝis en Telegramo: “Ĉe la pubo!” kun foto de la grupo ĉe drinkejo, kaj oni tuj rimarkis ke pubo, efektive, ne estas drinkejo. Tiu afiŝinto tuj redaktis la mesaĝon, anstataŭigante per ‘trinkejo’, sed ne antaŭ ol oni konstatis, ke eble utilis havi rektan vorton por la angla vorto *pub*. Kuo, Enriko, kaj Kartero kreis ĝin, sekve de tio, ke la deveno de la angla vorto estas mallongigo de “publika domo”. Ĝi certe iĝis la plej ofte uzata el tiu ĉi listo, ĉar ĝi uziĝis ĉiam, kiam iu menciis ĉi tiun publon.

– Ĉe UK en Burno kelkajn semajnojn poste, mi aŭdis de brito ke tie oni diras “pabo”, kiu estas pli taŭga esperantigo laŭ brita akĉento.

kvirtalo: Kvira kvartalo; kvartalo kie estas multe da GLAT-uloj kaj rilata kulturo. *Ho, ĉu ĉi tio estas la kvirtalo pri kiu mi aŭdis?*

– Brandono elpensis tiun ĉi tradukante la anglan esprimon “gayborhood”.

toki: Fumi kanabon. *[Johano] kaj [Julia] estas veraj tokemuloj.*

Kompreneble, ĉi-ideo venas de tio, ke oni ofte ŝerce esperantigas “mi toki pona” (mi parolas tokiponon) kiel “Mi tokas pone”. Sed du el tiuj vortoj ne ekzistas en Esperanto, do kion vere signifas tio? Mi decidis ke la solvo estas neologismo, konstatante ke estas jam angla vorto “toke” kun preskaŭ la sama sono, kaj prenis ĝin por Esperanto. Kaj la vorto montriĝis utila sufiĉe ofte dum la kongreso, enfine.

– Kelkajn tagojn antaŭ la UK, mi vizitis Berlinon kaj renkontis lokan tokiponiston kaj esperantiston, kiu proponis pli esperantecan ideon por la sama senco: *vumi*, de *fumi*, kiel *trinki* iĝas *drinki* kiam temas pri ebriiĝo.

poni: Venkegi kvazaŭ superregi la venkiton, ĉefe en videoludoj au komputil-hakado.¹

Alternativo al la senco en la ĉi-supra frazo “Mi tokas pone”. La ideo por la signifo venis de Brandono, iun fojon kiam mi trudis al grupo feliĉe ludanta iun interesan ludon kaj petis ideojn por tio, kion signifu “pona”.

– Semajnon post la UK, mi sukcesis aĉeti la ununuran libron de Karolo Piĉ, kiun mi trovis serĉinte en ambaŭ esperantaj libroservoj en Parizo, kaj trovis hazarde en la glosaro la jenan difinon: “*poni: meti, starigi*”.²

rizzo: Amindumlerteco, karismo — aŭ kiel usonaj junuloj diras, *rizz*. *Mi ne havas sufiĉe da rizzo por amindumi al ŝi.*

Kongresantoj bone atentis la duan ‘z’, ne konfuzante ĝin kun ‘rizo’.

ĥekŝi: Tro korekti, pedanti kiel loĵbanistaĉo. *Ne ĥekŝu min, kara...*

Ĉe la kongreso mi unuan fojon renkontis loĵbaniston, *la janbe*. Mi lernetis loĵbanon antaŭ jaroj, kaj tre ĝuis finfine renkonti unu el la proksimume dek fluaj parolantoj en la mondo, kaj ni pasigis kvazaŭ la tutan kongreson babilante pri loĵbano, planlingvoj, ktp. Estas malbona kulturo en iuj loĵbanujoj tro korekti anstataŭ interparoli kaj lasi onin lerni. La celo de loĵbano estas komuniki perfekte logike kaj precize, do nepre senerare! ‘Xekce’ estas neologismo en loĵbano kiu signifas tian korektadaĉon, kaj la vorto venas de nomo de retkomikso “xkcd” kiu publikigis unu bildstrion pri tio: “*Se vi lernus paroli loĵbanon, via komunikado estus tute senambigua kaj logika.*” “*Jes, sed estus nur kun tiaj homoj kiaj lernus loĵbanon.*”

komitoto: Komitato, kiu ankoraŭ ne formiĝis; estonta komitato. *Ĉi tiu reklamo por komitato efektive temas pri ‘komitoto’.*

Dum la kongreso estis sur tablo folioj reklamantaj por kelkaj komitatoj de E-USA, kiuj serĉas membrojn. Sur ĉiu reklamo estis la nomoj de jamaj membroj de la komitato, krom unu folio kiu montris, ke ankoraŭ ne estas membroj en la komitato kaj oni simple esperas ke iuj venu kaj komitatiĝu. Do Lua vidis kaj eknomis ĝin “komitoto”.

1. Venas de la slangaĵo *pwn*, mistajpo de la angla vorto *own*. Ambaŭ estas uzitaj kiel verboj por esprimi dominecon super alia.
2. Iuj legantoj memoros siatempan slangaĵon “mi poentegas” kun simila signifo, se sen la ĉikana elemento.

Ĉiuj ĉi vortoj estas kredeble neseriozaj, spontaneaj elpensoj — sed UE petis ĉi tiun artikolon por registri, kian efemeran ĵargonon oni kreas dum kongreso!

UK 2025: Usonano dua-UK-e eŭrope recenzas, rekomendas, kaj revas

kongresaj raportoj • S. Aleksandro SATO

Mi pensis, ke kiam ili preskaŭ ĉiuj foriris al Bosnujo, mi finfine havos tempon por skribi ĉi tion, sed ankoraŭ ne. Nur nun en la buso al Beogrado mi ektajpas. (Por atingi Zagrebon mi sidis ĉirkaŭ dek unu horojn en du aviadiloj. Por atingi Beogradon mi sidas ĉirkaŭ dek unu horojn (одинадцать, *jedanaest*) en unu aŭtobuso. Rigardu — tieas Паука!)

Ha? Kio? Ho, jes, la kongreso... oni petis min verki pri la kongreso... momenton, kalendaron, mi petas... dankon. Jam monato ekde tio pasis, monato da Esperanto, da la rusa, da lingvoj krom la angla... *jes!*

Mi memoras iam legi en artikolo de Libera Folio la frazon, ke “ĉiu devus partopreni en Universala Kongreso — sed ne pli ol unu fojon”, ĉar la programo kaj strukturo de UK-oj estas enuigaj, specife por “junuloj”. Mi ja estas junulo, sed mi malkonsentas pro pluraj kialoj — mi pensas, ke multaj programoj kaj prelegoj estas interesaj, kaj, nu, miaopinie, eblas partopreni almenaŭ du Universalajn Kongresojn. (Parenteze, tiu deklaro venas de 2018, do eble la situacio malsamas nun.)

Kiam mi ĉeestis mian unuan UK-on, mi ne konis homojn tie, kaj okupiĝis ĉefe de ĉeestado de prelegoj kaj eventoj, provado ekkoni novajn homojn, kaj rigardado de la libroservo. Pro malfrua aliĝo, mi ne ekskursis. Ĉi-foje, malsame, mi ĉefe okupiĝis pri tri aferoj: ekskursoj, pasigi tempon kun amikoj kaj jam konataj homoj, kaj KER-ekzameniĝi je la nivelo C2. Pro la tempo, kiun uzis tiuj, mi apenaŭ ĉeestis prelegojn (mi ĉefe ĉeestis la kurson de la ĉefha, kaj (parte pro ekskursoj) tion nur unufoje) kaj eventojn (krom iujn koncertojn kaj teatraĵojn), kaj eĉ ne sukcesis viziti la libroservon (mi ankoraŭ serĉas la *Kroatan militan noktolibron* de Spomenka ŠTIMEC).

Mi alvenis en Burno vespere la 26-an, de Prago, kie mi lastamine ŝanĝis mian FlixBus-bileton por povi pasigi iomete pli da tempo en Prago. (Malgraŭ tio, ke mi uzis mian dormotempon provante diversajn kreditkartojn kaj pagmanierojn je la retejo de *FlixBus*, mi bone uzis tiun lastan tagoparton en Prago, kion por tia strangulo, kia estas mi, konsistigis vizito al la muzeo/kirko, kie ĉefaj rezistantoj, partoprenintoj de la operacion *Anthropoid*, lastafoje batalis kontraŭ siaj naziaj ĉasantoj.)

Aĉetinte ŝajne nefunkciantan SIM-karton ĉe la praga flughaveno (jes, mi scias ke ili ĝenerale kostas pli tie; laŭ mi, tio estas pago, kiun oni pagas por la utilo ekhavi telefonservon pli tuje kaj facile), mi sidis en la burna aŭtobusa stacidomo, uzante interreton de paŭzantaj *FlixBus*-oj por Telegram-mesaĝi al unu mia konato kiun mi

teorie renkontontis ĉe la kongresejo. Post sufiĉe da interretumado, mi ekstaris de la stacidoma benko, iris al la trotuaro, konfuziĝis je transportsistemaj mapoj kaj aliaj ŝildoj, kaj finfine trovis tramon, kiu ĝuste portis min al la kongresejo.

Kiam mi alvenis al mia unua UK, mi trafiĝis de subita, neatendita miro dum mi alproksimiĝis la kongresejon — sento kaŭzita de la ekapero de sakoj kun esperanta teksto, kaj de la *buŝa parolado de Esperanto en la vera (kaj ne interreta) vivo*. Mi jam supozis, ke mi post tio (kaj post multaj lokaj renkontiĝoj) sufiĉe komprenas, ke Esperanto ekzistas en la vera vivo, kaj aparte ĉe kongresoj — sed en Burno min tamen duafoje trafis la surprizo kiam mi alparolis homon kun kongresa sako por ekscii la precizan lokon de la kongresejo kaj akceptejo, alproksimiĝis, kaj vidis tie sur la pordo de la universitato la pendantan ŝildon kun la flago de Esperanto...

Post tio mi utiligis la memservan pretmanĝvendejon en la ĉefa konstruaĵo uzita de la kongreso (ĉu ĝi nomiĝis Q aŭ X?), kaj renkontis mian konaton. Konatigitaj de komuna amiko kelkajn monatojn antaŭe, ni jam korespondis interrete en Esperanto kaj la serba, sed antaŭaj planoj renkontiĝi en Serbujo nuliĝis pro ambaŭflanka malsaniĝo. Nun ni finfine renkontiĝis vizaĝ-al-vizaĝe, kaj vidis la finon de la Movada Foiro.

Dimanĉon mi provis ĉeesti la kurson de la ĉefha (kiun instruis alia konato mia) sed (pro malsukcesa provado ĉesigi mian usonan interretan servon de tiu firmao *Xfinity*, kiu funkciis en apartamento en kiu mi jam ne plu estontis) malfruis sufiĉe ke mi ne certis ĉu estas ĝentile eniri. Anstataŭe mi renkontis kunĉeestanton de usonaj E-renkontiĝoj, tokiponiston, kaj post la kurso tiun, kiun mi renkontis la antaŭan tagon, kaj amikon, kiun mi renkontis ĉe antaŭa eŭropa kongreso, —

Skribu! Skribu! Antaŭ ol nia busado finiĝos, antaŭ ol mia kunvojaĝanto vekiĝos, mi devus fini la artikolon...

— kaj kiu portis sian fratinon kaj valizon iel reportitan de *Wizz Air*, kaj poste mi renkontis aliajn homojn...

Ŝajne neniun memoras, kio okazis lundon, krom tio, ke ni ĉeestis la teatraĵon de Verda Banano.

Malgraŭ tio, ke mi tre ĝuis pasigi tempon kun miaj amikoj, mi, ne sciinte miajn planojn, nek, ke estos junulara programo (ĝenerale) aŭ io kadre de ĝi merkredon, estis jam aliĝinta kvar ekskursojn, kiujn mi ĉeestis sinsekve

mardon, merkredon, kaj ĵaŭdon. Tiuj estis al *Slavkov*, *Kroměříž*, la burna stelobservejo, kaj *Lednice*.

“Ĉeĥujo havas la plej altan densecon de kasteloj el ĉiuj landoj en la mondo”, (miamemore) raportis mia patro telefone. Post ĉiuj tiuj ekskursoj, mi pensas, ke mi eble vidis sufiĉe da kasteloj. *Slavkov* interesis min pro ‘estetikaj’ (se amplekse diri la vorton) kialoj, t.e., pro sia rilato kun Napoleono kaj eŭropa milita historio, por kiu la vizitoj al la ne-kastelaj lokoj (kampo kaj monumento) pli utilis ol la kastelo mem; tamen, en la kastelo mi staris sur la balkono, de kie Napoleono anoncis al siaj soldatoj. Post kiam mi revenis de *Slavkov*, kaj post iomete da parolado kun amikoj, mi devis rapidi al mia C2-parolintervjuo, por kiu mi pretigis min malpli ol mi deziris.

Kroměříž mi elektis, verdire, ĉar mi timis neintence resti en mia hotelĉambro tuttage sen iu oficiala ekskurso, sed mi finfine trovis ĝin sufiĉe agrabla, aparte ĉar mi parolis kun interesaj kunĉeestantoj. Mi rekomendus ĝin al homoj, kiuj ŝatas ĝardenojn. Mi elektis pasigi ĵaŭdon ĉe *Lednice* ĉar mi supozis, ke estas kialo, kial ĝi aperas kiel ekskurso A1, kaj ankaŭ ĉar mi scias, ke mi ŝatas boatojn. Post kiam mi alvenis, mi trovis ankaŭ la arĥitekturon kaj kastelajn internaĵojn kaj la minareton interesaj.

Finfine, la stelobservejon mi apreziis ne nur pro la informoj (kiujn, se novaj, mi tamen verŝajne jam forgesis pro manko de perioda ripetado), sed ankaŭ ĉar ĝi aspektis tre profesia, kaj pro tio mirigis min (nu, mi ja ne taksas esperantistojn tro nekompetentaj por tio, sed mi esperas, ke vi komprenas), ke povas esti en Esperanto profesia stelobserveja prezento en urbo kiel Burno.

Ĉiuj ekskursoj ŝajnis sufiĉe bone planitaj al mi, kaj la tuja interpretado al mi profesia, kiajn aferojn mi ankoraŭ primiras, kvankam mi eble ne devus. Mi ankaŭ ĝuis paroli kun homoj, kiujn mi ne jam konis, dum la ekskursoj, aparte dum la manĝoj.

Dum tiuj tagoj mi, okupata kaj dormema, ne ĉiam sukcesis renkonti miajn amikojn. Tamen ni ĉeestis la koncerton de Kajto — tre belan kantarprezenton, kiu memorigas min pri iuj aliaj mondcivitanecaj, kvazaŭ infanarece (ne

malbonmaniere) pacemaj filozofi-komunumoj, kun kiuj, mi pensas, Esperanto tre taŭgas. “Kia tag!” — mi skribis en notlibro, sur kies kovrilo montritas ĉasaviadilo.

Vendredon mi maltrankvile studetis por mia KER-ekzameno, kaj post dormo venis al la kongresejo por sperti ĝin. Malfeliĉe por netagmanĝinto, sed ne tute neatendite, troviĝis, ke el la fridujo de la memservejo elĉerpiĝis sandviĉoj. Post mia KER-ekzameno, mi rajtis esti kun miaj amikoj kaj spekti la belan Internacian Artan Vesperon (ankaŭ tiu konsilindas al tiuj, kiuj neniam vidis ĝin), kaj sabaton nelonge post vekiĝo (almenaŭ miaokaze) ni forveturis al Varsovio, kaj de tie tra entute kvin landoj, haltante, certe, en Bjalistoko. Certe ni propagandetis Esperanton, kiam homoj demandis al ni, nu, kiun lingvon ĉi tiu stranga grupo de junuloj povas parolanti.

Krom tiuj tri ĉefaferoj, kiujn mi menciis, mi menciis plian avantaĝon de ĉeestado de dua UK: Mi fakte trovas, ke mi renkontis ĉe la UK multe da homoj, kiujn mi renkontis antaŭe en Esperantujo. Mi certe aparte interesiĝis pri miaj amikoj kaj korespondantoj, sed ankaŭ tre interesis min revidi kaj paroli kun homoj, kiujn mi svage konis aŭ memoris, kio produktis bonajn sentojn kaj multajn tre interesajn konversaciojn.

Do finfine mi konsentas kun la pli milda, verŝajne pli intencita diraĵo en tiu artikolo de *Libera Folio*, ke E-istoj — nu, ĝenerale — vizitu UK-on *almenaŭ* unufoje. Tiam mi konsilus vidi la Movadan Foiron, la libroservon, kaj iom da prelegoj, por kompreni kiaj estas Esperanto kaj ĝia movado. Tio estas bona tempo por ekkoni novajn homojn, kaj eblas ankaŭ ekskursi. En dua UK, eblas tiam renkonti tiujn homojn, kaj ĉeesti novajn prelegojn kaj ekskursojn. Sed kun amikoj kaj konatoj, la kvanto da ĉeestindaj UK-oj povas esti senlima.


En ĉi tiu urbo mi nun solas. Mi bone ĝuis mian monaton, kaj nun komenciĝas alia. (*Бсѣ — кончено. / Бсѣ — начато! / Аŭда в кино.* “Ĉio finitas. Ĉio komencitas. Ek al kinejo!”) Mi ankoraŭ ne scias precize kio sekvos, sed — estontecen!

Bildstrioj

ĝercoj

La vivo de Peĉjo

Timothy BORONCZYK



Kaĉo sen ĉapelo

Izako ZAVIRUĤA



CALICO kaj Esperanto

lingviko • Derek Roff



Ĉu vi sciis, ke dum pli ol dudek jaroj, la esperantistaro donas premion pri lingvo-instruado al membro de CALICO? Kio estas CALICO? Kial esperantistoj interesiĝu pri ĝi?

CALICO (*Computer Assisted Language Instruction Consortium*) estas internacia organizo de profesiaj lingvo-instruistoj kaj esploristoj, kiuj okupiĝas pri tio, kiel pli efike instrui lingvojn per la lerta uzado de teknologio. Ĝi estas unu el la du plej grandaj asocioj kun tiu celo en la mondo. CALICO fondiĝis en la jaro 1983, kun la plano interŝanĝi informojn kaj spertojn pri pli bonaj manieroj instrui lingvojn. Teknologio por lingvo-instruado prezentis grandajn defiojn, en tiu periodo.

En 1980, VHS-vidbendoj estis preskaŭ novaj. Video-kameraoj konektiĝis al aparta registriilo kun du bobenoj por la vidbendo. Ĉu vi memoras kiel primitivaj komputiloj estis en 1983? Kredeble, tio estas longe antaŭ via naskiĝo! Sed eble vi legis pri la limoj de teknologio en tiu jaro, rilate al lingvo-lernado. Komputiloj ne kapablis prezenti videon sur la ekrano. Manipuli sondosierojn ne estis facile. La plej popularaj komputiloj en Usono ne povis montri eĉ la supersignojn de la hispana aŭ la franca. Oni forgesu pri la japana, la ĉina, aŭ Esperanto. Kompreneble, kutima lingvo- lernanto ne havis poŝtelefonon, nek la Interreton.

En tiu jaro, la fondantoj de CALICO ĉefe havis esperon pri pli bona estonteco en lingvo-lernado. Nia komunumo rekonis ilin kiel esperantojn, eĉ se la jaro de oficiala kunlaboro kun esperantistoj devis atendi dudek jarojn pli. Tiuj esperantoj de CALICO energie esploris pri tio, kiel krei lingvo-lernilojn, kiuj estas pli efikaj kaj interesaj por la lernantoj. Ili bone progresis dum ĉiu jaro. Mi, via verkinto, havis la bonŝancon viziti mian unuan jaran kunvenon de CALICO en 1992. Tio estis bonega sperto. Mi tre multe lernis, kaj ekhavis plurajn novajn amikojn. La sperto ŝajnis al mi simila al renkontiĝo de esperantistoj.

Mia laborposteno permesis al mi ĉeesti la jaran kunvenon de CALICO en preskaŭ ĉiu sekva jaro. En 1996, mia universitato gastigis la jaran kunvenon. Iom poste, mi

elektiĝis al la estraro de CALICO. La membroj de CALICO estas lingvo-instruistoj, do ili plejparte jam aŭdis pri Esperanto, sed ofte de malfidindaj fontoj. Bedaŭrinde, en tiu periodo, kursoj kaj lernolibroj pri lingvistiko ofte prezentis falsaĵojn. Mi mem studis el libro en universitata kurso, kiu diris, ke ne eblas vortludi en Esperanto! Do, homoj, kiuj lernis nur el tiaj fontoj, subtaksis la valoron kaj intereson de Esperanto. La ĉeesto de veraj esperantistoj, inkluzive fojajn prezentaĵojn de Duncan CHARTERS, Ian RICHMOND, Steven BREWER, Mark FETTES, kaj aliaj, donis al CALICO pli fidindan bildon de Esperanto. Ili povis vidi ke ni dividas la celojn de CALICO pri la serioza serĉado de pli bonaj manieroj instrui lingvojn.

Ĉirkaŭ la jaro 2000, Cathy kaj Bill SCHULZE testamentis grandan sumon al *Esperantic Studies Foundation* (ESF), kun celoj tre similaj al tiuj de CALICO: subteno de edukado kaj esplorado pri lingvoj kaj lingvo-instruado. La momento por kunigi la du grupojn alvenis. En 2002, ESF invitis proksimume dudek esperantistajn lingvo-instruistojn el multaj landoj al la jara kunveno de CALICO en Sakramento, Kalifornio. La sperto estis tre valora por la esperantistoj. Ili povis renkonti profesiajn esploristojn kaj instruistojn, kiuj prezentis multajn novajn ideojn kaj alirojn al lingvo-instruado. La interŝanĝo de informoj spronis antaŭensulton en la instruado de Esperanto.

Tio estis la periodo, kiam la Interreto ekfariĝis valora rimedo kaj ejo por lingvo-lernaj materialoj. *Lernu.net* kaj *Edukado.net* ekfloris en tiuj jaroj. Ankaŭ ene de CALICO, la Interreto estis fokuso de multa instrua laboro kaj novaj rimedoj. La kuniĝo de CALICO kaj esperantistoj estis granda sukceso, sed kiel daŭrigi tion? Ne estis mono por denove venigi grandan grupon al CALICO, kaj Esperantujo ne havis similan kunvenon, kiu interesus la membrojn de CALICO. Ĉu tiu fruktodona kunlaboro fariĝus forgesita memoro? Mi ekhavis ideon.

Kial Esperantujo ne starigu ĉiujaran premion al membro de CALICO por ties elstara lingvo- instrua retejo? Tiel, Esperanto kaj CALICO rememoros siajn komunajn celojn kaj laborojn en ĉiu jara kunveno. Mi ricevis aprobon kaj financan subtenon de ESF proponi tian premion al CALICO. La estraro de CALICO ŝatis la ideon. Ambaŭ grupoj interkonsentis pri la detaloj, kaj ekestis la *Esperanto "Access to Language Education" Award* (Premio "*Aliro al Lingva Edukado*"). Kun la helpo de Grant GOODALL, Mark FETTES, kaj aliaj, ni kreis la regularon, kaj anoncis en 2003, ke ni prezentos la unuan premion en

la jara kunveno de CALICO en 2004. Unu el la gravaj reguloj estis ke la retejo devas esti libere alirebla de lernantoj el la tuta mondo. Ni ne akceptas retejojn, kiuj fermas la lern-materialojn nur al studentoj de ties propra universitato.

La premio sukcese kaptis la intereson de membroj de CALICO. En la unua jaro, retejo por sendependa ekzercado en la hispana gajnis la unuan premion. La postan jaron, retejo de instruaj rimedoj por ĉiuj instruistoj de la germana ricevis la premion. En la tria jaro, estis tiom da bonegaj kandidatoj, ke ni donis tri premiojn! Trans la jaroj, grandaj kaj malgrandaj lingvoj ricevis la premion: la ĉina, la rusa, la araba; sed ankaŭ la flandra, la makedona, la ajmara, kaj aliaj. La premion oficiale prezentas ESF, CALICO, kaj *Edukado.net*. Vi povas rigardi la liston de ĉiuj gajnintoj ĉi tie: <https://calico.org/home/awards/>

En normala jaro, ni ricevas kvar ĝis dek kandidatojn por la premio. La elekta komitato zorge kontrolas ilin, kaj fine

elektas unu por ricevi la premion por tiu jaro. Ni anoncas la gajnanton dum la Ceremonio de Premioj en la jara kunveno de CALICO. Tiel, la membraro vidas en ĉiu jaro ke Esperanto estas serioza lingvo, kiu subtenas la lingvo-instruan laboron de CALICO kaj ties membroj. La efiko de tiu longa kunlaborado estas tre sentebla. Kiam ni lanĉis la premion, multaj el la membroj ne lernis pri Esperanto, aŭ estis mis-informitaj. Nun ĉiuj scias pri Esperanto, kaj taksas la premion esti tre grava kaj estiminda afero. Membroj portas pozitivan sintenon al siaj universitatoj kaj al siaj diversaj landoj. En mia opinio, la interkonsento inter CALICO kaj ESF estas modela profesia kunlaboro.

En 2026, la jara kunveno de CALICO estos en Miami, Ohio. Se vi instruas lingvon, vi povos proponi prezentaĵon por la kunveno. Ĉiuj rajtas partopreni. Mi estos tie por prezenti la 23-an premion, “*Aliro al Lingva Edukado*”. Kiu lingvo kaj retejo gajnos ĝin?

Pico

senintenca esperantaĵo • Lua HALL



Toronto estas urbo diversa kaj multkultura... sed la karavano de malsataj esperantistoj ne atendis tiel varman bonvenigon, kiel restoracio en ties propra lingvo! La literojn indas pli bone kunŝovi, tamen...

La danĝera lingvo

libroj • Lua HALL

“Lingvo estas dialekto kun armeo kaj floto”, kiel popularigis la jidolingvisto Max WEINREICH, kaj Esperanto, idiomo de paco kaj humanismo, estas de tio maksimume for. Kial do Esperanto estis foje traktata kvazaŭ la plej danĝera lingvo?

Tion malkovras tiu ĉi libro de germana historiisto Ulrich LINS. La nuran ideon, ke Esperanto estis iam ajn la objekto de persekutado, oni traktas kiel tabuon. Certe — oni supozas — esperantistoj troviĝis hazarde inter la viktimoj de la Holokaŭsto en Nazia Germanujo, kaj de la Granda Purigo en Soveta Unio. Kaj certe, en esceptaj okazoj, famaj esperantistoj estis ĉasitaj pro ilia konateco; estas fakto sufiĉe vaste konata, ke ĉiuj gefiloj Zamenhof estis ekzekutitaj de la nazioj, (p.110) kaj ke Hitler mem abomenis Esperanton kiel judan lingvon. (85) Sed pro evidenta ligo al judoj kaj al internaciismo, oni emas konkludi, ke ajna subpremiĝo de esperantistoj esence apartenas nur al pli vasta subpremiĝo de judoj aŭ de suspektataj spionoj. Pro tio oni hontas nomi esperantistojn “persekutitaj”, kvazaŭ pretendo.

La historio tamen diras, ke neniam estis escepto, sed intenca artifiko, per kiu aŭtoritatuloj sisteme kaj kviete subpremis Esperanton. Tion la nazioj dokumentis surprize bone; jam en 1935, la Ministerio pri Propagando, estrata de Paul Joeseph Goebbels, skribis en letero responde al konsilo malpermesi esperantajn organiziĝojn: “Inter la milionoj da adeptoj de Esperanto en eksterlando certe troviĝas tre granda nombro, kiu estas nepolitika kaj vidas nur la idean flankon de la strebadoj de Esperanto. Pro agado iliaopinie tute sendanĝera, kia ja estas la lernado de nova lingvo, ĉiuj ĉi homoj ricevos la impreson, ke en Germanujo eĉ tiaj asocioj estas persekutataj.” Per tio ĝi konkludis ne, ke la esperantaj asocioj fakte estu permesitaj kiel sendanĝeraj, sed ke la ŝtato nerekte “strebuj al ilia — ‘per iom da premo facile atingebla’ — libervola dissolviĝo”. (99)

Kaj en Sovetunio neniam venis publikaj, oficialaj atakoj kontraŭ Esperanto en la amaskomunikiloj; (233) tial dum funkciuloj de la Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) ekestis malaperigitaj, “ĉiu pensis: ho, eble li faris iun mispaŝon”. Eĉ kiam oni komencis suspekti, “ke okazis io



maljusta”, oni ankoraŭ ne kulpigis Esperanton — devis esti vualitaj “kontraŭsovetiaj elementoj”. (238) Dume, tiuj malaperigitaj aŭdis pli-malpli la saman akuzon: “Vi estas aktiva membro de internacia spiona organizaĵo, kiu sin kaŝis sur la teritorio de USSR sub la nomo de Sovetrespublikara Esperantista Unio.” (239)

Prave, tio falas sub la ombrelo de “suspektataj spionoj”, sed pro kio la tuta SEU estis suspektata? Ĉu ĝiaj estroj komplotis kontraŭ la reĝimo? Ĉu ĝiaj membroj subtenis malamikojn de la ŝtato?

Nu, la sovetia esperantistaro okupis sin pri efektive du aferoj, ofte samtempe: propagandi por komunismo, kaj korespondi kun eksterlandanoj. Korespondado fakte konsistigis la ekzistokialon de la Esperanto-movado en Sovetunio, ĉar tiel, sen rajto vojaĝi eksteren, oni ankoraŭ povis “kontribui al la tutmonda solidareco de la laboristoj”, (255) sen kio la lingvo estus apenaŭ praktikinda. Komence, en la dudekaj jaroj, tia korespondado estis granda sukceso por la movado, kaj enlande kaj eksterlande; laŭ unu raporto, Esperanto fariĝis la kvara plej instruata lingvo en sovetiaj lernejoj post la angla, la germana kaj la franca, (163) dum la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), sub “unueca fronto” kun SEU, kreskis de 1064 membroj al 6500 inter la jaroj 1922 kaj 1929. (146)

La korespondoj tamen baldaŭ venigis krizostaton. “La idealo estis, ke la okcidentaj kamaradoj raportu pri la revolucia batalo en sia lando kaj ke iliaj sovetiaj korespondantoj rakontu pri la postrevoluciaj atingoj de Soveta Unio — ke do la interŝanĝo de leteroj servu al reciproka stimulado persisti en la komuna lukto por liberigo de la proletaro.” (256) Tamen, per leteroj tro sinceraj oni ĝenis la entuziasmon de eksterlandanoj pri socialismo, kaj seniluziis sovetianojn pri la “baldaŭ kolapsonta” kapitalismo; unu konkludis, ke “francaj laboristoj vivas en kvazaŭ paradiza lando”. (260) Multaj okcidentanoj skribis al SEU por konfirmi la onidirojn pri malriĉeco, malsato kaj mallibereco, pro kio ĝi plurfoje admonis siajn membrojn pri “mensogaj sciigoj” kaj “misinformado”. (166)

Post nelonge aperis suspektoj, ke la korespondadon ekspluatita “malamikoj de l’ laborista klaso” por saboti la socialismon, (168) kaj tion aŭtoritatuloj sendube traktis kiel pravigon por subpremado. Tamen la ordinarnaj membroj vere nur aŭ priskribis la realaĵojn (kiel ajn mizere), (262) aŭ defendis sian ideologion (kiel ajn akre), (266) aŭ skribis simple “pri ĝeneralaj, ĉiutagaj aferoj”, evitante “ĉiun enmikson da politiko en niaj leteroj”. (272) Por sia parto,

SEU faris ĉian paŝon por konformigi sin al la reĝimo, inkluzive per konstantaj direktado kaj riproĉado al sia membraro, kaj per lanĉo de nova programo “kolektiva korespondado”, en kiu leteroj estis neniam privataj, sed makleritaj de SEU kaj publikigitaj en ĝiaj gazetoj. (167)

Ĉio ĉi estis nesufiĉa por ŝirmi sin kontraŭ kondamno. Enfine centoj da esperantistoj estis cele arestitaj, kelkdek pafmortigitaj. Laŭ unu takso, ĝis kvin mil e-istoj pereis en gulago. (239) La solaj, kiujn ŝparis la ŝtato, estis tiuj, kiuj jam forlasis Esperanton, ĉu pro enuo, ĉu pro aŭguro de danĝero. (240)

Laŭ interna dokumento, en la Granda Purigo suspektatoj estis grupigitaj jene: (1) kontraŭsovetiaj elementoj; (2) aktivaj membroj de eklezio; (3) membroj de religia sekto; (4) ribeluloj (aktivistoj); (5) civitanoj kun kontaktoj al eksterlando. Kredeble esperantistoj apartenis al la ĉi-lastaj grupo; sed mirige, esperantistojn la ŝtato aparte nomis kiel membrojn de tiu grupo, same kiel poŝtmark-kolektistojn, aldone al la civitanoj, kiuj havis parencojn, amikojn aŭ vivsperton en eksterlando. (242)

Ankaŭ la tiama Germana Esperanto-Asocio (GEA) ne povis malhelpi sian persekutiĝon, malgraŭ sia daŭra komplezado al la Nazia Partio: rezignante sian neŭtralpolitikan statuton; (91) uzante Esperanton por naci-socialisma propagando; (92) kaj elpelante siajn judajn membrojn. (95) Iliaj penoj estis tiel vanaj, ke unu nazia studenta artikolo mokis tion, “ke la Germana Esperanto-Asocio estas tiel naŭva kredi, ke ĝi *per sia internaciisma artefarita lingvo* povas ĉe la jud-marksisme influitaj laboristoj de fremdaj ŝtatoj *propagandi por nacieca ideo*, kia estas la naci-socialismo”. (100)

Post iu grado, ne plu eblas divorciĝi Esperanton de la motivoj de persekutado, ĉar Esperanto fakte estas pli ol nura lingvo. Kvankam la E-movado estis ĉiam neprecize difinita, Esperanto kiel artefarita lingvo dekomence reprezentas iujn idealojn: interpopola komunikado, libervola asociiĝo, kaj disa informado — aferoj nekongruaj kun aŭtokratio. Tio eĉ ne aludas ĝian “internan ideon”, kies principojn de pacemo, interfrateco kaj humanismo klare rifuzas tia reĝimo; nur la bazajn idealojn, sen kiuj ĝi perdus

sian ekzistokialon. Kiel konstatas Lins, en Sovetunio “la problemo ne estas misuzo de korespondado, sed la korespondado en si mem”. (273)

Tamen eĉ nura lingvo motivis subpremon. La nazioj protestis ĉiun lingvon, kiu minacis la “purismon” de la germana, (81) kaj ilin aparte insultis influo de Esperanto kiel “senanima kreaĵo”. (84) Ĉiuokaze neniu komunikilo rajtis konkuri kun la postulo de Hitler, ke negermanoj “neniel estu permesitaj pli alta eduko [...] ol maksimume la signifo de la trafikaj indikiloj”. (108) Simile, la sorto de Esperanto en Sovetunio koincidis kun la stalinisma tendenco sufoki ĉiujn naciajn lingvojn favore al la rusa — la “venkinta” lingvo — malgraŭ multjara insistado de Stalin kontraŭ “grandrusa” altrudo. (287) Indas substreki la sisteman forpuŝon de iuj ajn lingvoj kiel malbonan aŭguron.

* * *

Iusence pli obstina estas lingvo, kies parolantaro ĝin ne heredis sed mem elektis. La persiston de Esperanto nepre helpis ĝia diasporeco, kun ĝermoj en ĉiu lando. Sed mi rimarkas kun domaĝo, ke ĝi ne vere refloris ĝis, kiel multaj tiam atendis, “de supre ven[is] permeso” — kion oni eĉ tiutempe mallaŭdis kiel senkuraĝa: “ne atendu, sed agu por paco”. (307) Necesas konsideri: Kion vi farus, se vi estus parolanto de danĝera lingvo?

La granda ironio estas, ke kiam *Stasi* — la Ministerio pri Ŝtata Sekureco en Orienta Germanujo — komisiis en la okdekaj jaroj esploron pri la esperantista junularo tie, ĝi konstatis nur ĝian sendanĝerecon. Rezultis 200-paĝa raporto tiel senfrukta, ke la spiono prilaborinta ĝin demisiis pro frustriĝo. Pri Esperanto almenaŭ ses aliaj spionoj “infektiĝis de ĝia ĉarmo kaj tial iĝis ne plu utilaj por la reĝimo”. (322) Verdire Esperanto estis neniam pli danĝera al potenculoj ol al siaj parolantoj mem.

Lins, Ulrich. *La danĝera lingvo* - Nova, reviziita eldono. 375 paĝoj. Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 2016. ISBN 978-92-9017-128-7. Ĉe UEA-katalogo (nehavebla): <<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9318>>

Mikronoveloj

Solvoj

Timothy BORONCZYK

La robotabeloj estis teknikaj mirindaĵoj, senlace flugantaj de floro al floro. Homoj atendis abundan rikolton malgraŭ la malapero de insektoj. Ĉio ŝajnis en ordo ... ĝis aŭdiĝis tondro, kaj ekfalis pluvo. La etaj maŝinoj, bone faritaj sed ne por laboro en pluvo, misfunkciis pro kurtaj cirkvitoj. Plantoj staris silente en la kampoj, atendante polenadon neniam venontan. Tiam la homoj eksciis, ke ne ĉiuj problemoj estas teknologie solveblaj.

Eble vi taksas la rakonton stulta. Homoj sufiĉe inteligentaj por konstrui artefaritajn abelojn estus sufiĉe inteligentaj por antaŭvidi pluvon, ĉu ne? Sed se ili vere estus inteligentaj, ili ne estus detruintaj la medion.




Kiam en Romo

Debra HAMEL

Por plej profite vojaĝi, spertu kiel denaskulo. Akiru frazlibron. Manĝu lokajn specialaĵojn. Vestu sin indiĝene.

Tial Adamo mendis vestaĵojn. Li nun surmetas novan ĉemizon, sed ĝi ne bone konvenas. Unue konfuzite, li baldaŭ ridas pro sia stulteco kaj rigardas bildon: Li frue petis, ke AI-bildgeneratoro kreu, kiel stilgvidilon, realisman foton de elegantulo. Li studas ĝin: belulo portanta ĉemizon kiel la lian, memfide rigardanta foren. Adamo tiel pozas kaj, farante neprajn ŝanĝojn, alĝustigas sin al la ĉemizo. Poste li drapiras kravaton ĉirkaŭ la kolon kaj rigardas enspegule dum li ligas ĝin per siaj novaj, sesfingraj manoj — ĝuste kiel en la bildo.



La elmigrintoj

Maurizio "Rico" GIACOMETTO, Clarence BICKNELL

Enprozigito de "La elmigrintoj" de Clarence BICKNELL.

Kiam tutnova edzo forlasis, plena je espero, la gepatran landon, lin akompanis varme loga vento de somero. "En la tutnova lando," li pensis, "mi trovos riĉon. Kaj post la alveno via," li diris al sia juna edzino, "la feliĉon."

Post semajnoj, en letero, li lakone skribis: "Kruda lando, penaj provoj. Sed ..." li aldonis, "... mi jam laboras. Mi trafos celon. Rapidu: portu al mi vian belon." Post longa pripensado kaj malfacilaĵoj, ŝi finfine decidis sekvi lin en la novan landon. La planado estis longa; la forlaso malcerta. La vojaĝo danĝera. Ili finfine rekuniĝis. Bele estis vidi lin denove. Sur foto tombeja.



Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

Adoptita kaj proklamita de Rezolucio 217 A (III) de la Ĝenerala Asembleo, 10-an de Decembro 1948

La Manifesto de Toronto, presita en ĉi tiu numero, aludas homajn rajtojn kiel kolonon de la organizita Esperanto-movado. La redakcio opinias prudente presi akompane la internacie konsentitajn homajn rajtojn, kiujn subskribis 48 landoj, inkluzive de preskaŭ ĉiu nacio en la tuta Ameriko, la plimulto de la Mez-Oriento kaj de suda kontinenta Azio, kelkaj afrikaj kaj eŭropaj landoj, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. La plimulton de ĉiuj ĉi rajtoj ampleksas la posta Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, ratifikita de 174 landoj kaj subskribita de ses plu.

Antaŭkonsideroj

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,

Pro tio, ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro, kaj ke la efektivigo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinara homoj,

Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,

Pro tio, ke la Ŝtatoj-Membroj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por plena realigo de tiu sindevigo,

Tial, nun,

La Ĝenerala Asembleo,

Proklamas tiun ĉi Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kiel komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj, por tio, ke ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, per instruado kaj edukado strebu al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan agnoskon kaj

observadon, same tiel inter la popoloj de la Ŝtatoj-Membroj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jurisdikcio.

Artikolo 1

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus kondukti unu al alia en spirito de frateco.

Artikolo 2

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato. Plie, neniam diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.

Artikolo 3

Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Artikolo 4

Neniu estu tenata en sklaveco aŭ servuteco; sklaveco kaj sklavkomerco estu malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.

Artikolo 5

Neniu suferu torturon aŭ kruelan, nehuman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.

Artikolo 6

Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

Artikolo 7

Ĉiuj homoj estas jure egalaj, kaj rajtas sen diskriminacio al egala jura protekto. Ĉiuj rajtas ricevi egalan protekton

kontraŭ kia ajn diskriminacio, kiu kontraŭas tiun ĉi Deklaracion, kaj kontraŭ kia ajn instigo al tia diskriminacio.

Artikolo 8

Ĉiu rajtas ricevi de la kompetentaj naciaj tribunaloj efikan riparon pro agoj, kiuj kontraŭas la fundamentajn rajtojn, kiujn li havas laŭ la konstitucio aŭ la leĝoj.

Artikolo 9

Neniu suferu arbitrajn areston, malliberigon aŭ ekzilon.

Artikolo 10

Ĉiu en plena egaleco rajtas je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prijuĝo de liaj rajtoj kaj devoj kaj de kiu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.

Artikolo 11

1. Ĉiu akuzita pro punebla faro rajtas, ke oni supozu lin senkulpa, ĝis oni pruvos laŭleĝe lian kulpon en publika proceso, en kiu li ricevis ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.
2. Neniu estu konsiderata krimkulpa pro kia ajn ago aŭ neago, kiu ne konsistigis puneblan faron, laŭ nacia aŭ internacia juro, en la tempo, kiam ĝi estis farita. Same tiel, ne estu aljuĝita pli severa puno ol tiu, kiu estis aplikebla en la tempo, kiam la punebla faro estis plenumita.

Artikolo 12

Neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondadon, nek atakojn kontraŭ sia honoro aŭ reputacio. Ĉiu rajtas ricevi juran protekton kontraŭ tiaj intervenoj aŭ atakoj.

Artikolo 13

1. Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato.
2. Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon.

Artikolo 14

1. Ĉiu rajtas peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon kontraŭ persekuto.
2. Tiu rajto ne estas alvokebla en kazoj de persekutaj akuzoj malfalse levitaj pro ne-politikaj krimoj aŭ pro

agoj kontraŭaj al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 15

1. Ĉiu rajtas havi ŝtatanecon.
2. Al neniu estu arbitre forprenita la ŝtataneco, nek rifuzita la rajto ŝanĝi sian ŝtatanecon.

Artikolo 16

1. Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen ia ajn limigo pro raso, nacieco aŭ religio, rajtas edziĝi kaj fondi familion. Iliaj rajtoj estas egalaj koncerne la geedziĝon, dum la geedzeco kaj koncerne eksedziĝon.
2. Geedziĝo okazu sole laŭ libera kaj plena konsento de la geedziĝontoj.
3. La familio estas la natura kaj fundamenta grupunuo de la socio, kaj ĝi rajtas ricevi protekton de la socio kaj de la Ŝtato.

Artikolo 17

1. Ĉiu rajtas proprieti havaĵon, kaj sola kaj en asociiĝo kun aliaj.
2. Al neniu estu arbitre forprenita lia proprieto.

Artikolo 18

Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola ĉu kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado.

Artikolo 19

Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.

Artikolo 20

1. Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo.
2. Neniu estu devigita aparteni al asocio.

Artikolo 21

1. Ĉiu homo rajtas partopreni la regadon de sia lando, aŭ rekte aŭ pere de libere elektitaj reprezentantoj.
2. Ĉiu rajtas je egala aliro al publika servo en sia lando.

3. La volo de la popolo estu la bazo de la aŭtoritato de la registaro; tiu volo estu esprimata per regulaj kaj aŭtentikaj elektoj, kiuj okazu per universala kaj egala balotrajto, kaj per sekreta voĉdono aŭ ekvivalentaj liberaj voĉdonaj proceduroj.

Artikolo 22

Ĉiu, kiel membro de la socio, havas rajton je socia sekureco kaj povas postuli la realigon, per naciaj klopodoj kaj internacia kunlaboro, kaj konforme al la organizo kaj disponeblaj rimedoj de ĉiu Ŝtato, de tiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kiuj estas nepre necesaj por lia digno kaj por la libera disvolviĝo de lia personeco.

Artikolo 23

1. Ĉiu havas rajton je laboro, je libera elekto de sia okupo, je justaj kaj favoraj laborkondiĉoj kaj je protekto kontraŭ senlaboreco.
2. Ĉiu, sen ia ajn diskriminacio, rajtas ricevi egalan salajron pro egala laboro.
3. Ĉiu, kiu laboras, rajtas ricevi justan kaj favoran kompenson, kiu certigu por li mem kaj por lia familio ekziston konforman al homa digno, kaj kiun suplementu, laŭnecese, aliaj rimedoj de socia protekto.
4. Ĉiu rajtas formi kaj aliĝi sindikatojn por protekto de siaj interesoj.

Artikolo 24

Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo, inkluzive racian limigon de la laborhoroj kaj periodajn feriojn kun salajro.

Artikolo 25

1. Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵoj, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, malkapablo, vidvineco, maljuneco aŭ alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.
2. Patrineco kaj infaneco rajtigas al specialaj prizorgoj kaj helpo. Ĉiuj infanoj, egale ĉu ili naskiĝis en aŭ ekster geedzeco, ricevu saman socian protekton.

Artikolo 26

1. Ĉiu havas rajton je edukiĝo. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj. La elementa edukado estu deviga. La teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ ties meritoj.

2. Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de paco.
3. Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.

Artikolo 27

1. Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturen vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciencajn progresojn kaj ĝiajn fruktojn.
2. Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj materialaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktaĵoj, kiujn li aŭtoris.

Artikolo 28

Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaracio povas esti plene realigitaj.

Artikolo 29

1. Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco.
2. En la uzado de siaj rajtoj kaj liberecoj, ĉiu estu subigita sole al tiuj limigoj, kiuj estas jure difinitaj ekskluzive kun la celo certigi adekvatan rekonon kaj respekton por la rajtoj kaj liberecoj de aliaj kaj por konformiĝi al justaj postuloj de moralo, publika ordo kaj ĝenerala bonfarto en demokrata socio.
3. Tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas en neniuj okazo efektivegeblaj kontraŭe al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 30

Nenio en ĉi tiu Deklaracio estu interpretita kiel implico, ke iu ajn Ŝtato, grupo aŭ persono iel ajn rajtas entrepreni ian ajn agadon aŭ plenumi ian ajn agon, kiu celus detrui kiun ajn el la rajtoj kaj liberecoj ĉi-ene difinitaj.

La teksto estas represita el la Ofico de la Alta Komisararo de la Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj, fontinta de la Universala Esperanto-Asocio.

Kolofono

Usona Esperantisto estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 200–2000 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun via nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevatajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimataj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redakcio aŭ de Esperanto-USA.

Sendu kontribuojn al bulteno@esperanto-usa.org.

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

La limdato por artikoloj en № 2025:4 estas la **15-a de Novembro**. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon en la bulteno kaj en aliaj eldonaĵoj. Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.

Redakcia teamo: Alena ADLER kaj Lua HALL.

Aŭtoroj

Matt Brooks

Mateo BROOKS ekstudis Esperanton en 2017 kaj pasie verkas poezion, kiun li lastatempe adaptas al kantoj per artefaritaj intelektoj kiel Suno. Li parolas kvar lingvojn kaj studas multajn aliajn per platformoj kiel Duolingo. Kun pli ol dek jaroj da sperto en estraroj de neprofitcelaj organizaĵoj kaj pli ol dudek jaroj en financaj kaj teknologiaj postenoj ĉe grandaj firmaoj, li kontribuas kiel Kasisto de E-USA per vasta scio kaj sperto. Liaj literaturaj verkoj haveblas ĉe blog.brooksny.net.

<matt.brooks@esperanto-usa.org>

Bill Maxey


Bill adoptis Esperanton kiel parton de sia identeco jam dum sia unua NASK, en 1994. Ekde tiam la esperanta kulturo diversmaniere pliriĝigas lian vivon. Li ofte (ĝoje!) legas, foje verkas kaj prelegas, kaj kutimas estri la programon de la ĉiujara Printempa Esperanto-Renkontiĝo (PER).

<billmaxey2@gmail.com>

Jorge Rafael NOGUERAS

Rafa estas plurfoje premiita verkisto en Esperanto, kaj “onklo” en la programo *Ekparolu!*. Li instruas la lingvon kadre de la Nord-Londona Esperanto-klubo, kaj estas parto de la teamo, kiu prizorgis la Esperanto-kurson en Duolingo, ĉefe kiel voĉleganto de la frazoj.

<rafaeln@alum.mit.edu>



S. Aleksandro SATO

S. Aleksandro SATO, usonano, verkas, lingvumas, kaj aspiras ŝanĝi la mondon. En Esperantujo, ri estis instruisto, renkontiĝ-okaziganto, kaj en 2025 la “plej bona reganto de Esperanto”. Esperanto, ria tria lingvo, estas suspektata roli en lingvolavango, kiu nun ampleksas almenaŭ ok lingvojn. Krom ŝanĝi la mondon, ri ankaŭ deziras paroli pli da lingvoj, paroli ilin pli bone, kaj kontribui verkaĵojn al Esperanto-literaturo.

Derek Roff

Derek emeritiĝis el kariero ĉe la Lingvo-Lerna Centro de la Universitato de Nova Meksiko, kie li laboris kun profesoroj kaj instruistoj en siaj esploroj, kaj en evoluigo kaj liverado de teknologiaj edukaj materialoj por plibonigi la lernajn spertojn de la studentoj. Krom tio, Derek estas aktiva en studgrupoj pri neviolenta komunikado, kaj retaj edukaj diskutoj pri rimedoj por lingvo-lernado, lignolaborado, ekologia daŭripovo kaj natura konstruado.

Lua Hall


Lua konsistigas duonon de la redakcio de *Usona Esperantisto* ekde 2024. De 2020 ŝi estas administranto de la plej granda esperanta komunumo ĉe *Discord*. Profesie ŝi laboras kiel analisto pri ciberminacoj.

<lua.hall@esperanto-usa.org>



Krome kontribuis:

Preston FIRESTONE • Kartero WILLIAMS • Anne SCHILL • Paul GUBBINS • Jakobo STERLING • Teodoro “jan Tepo” DUBOIS • Timothy BORONCZYK • Izako ZAVIRUHA • Debra HAMEL • Maurizio GIACOMETTO • Clarence BICKNELL



En 2024, esperantistoj subtenis georfojn en Kongo pri lernejo-rilataj kostoj kadre de Asocio Nova Familio en Goma. Jam en 2025 alvenas la fino de la unua monato de la lernojaro, kaj ankoraŭ neniam tiam subteno okazis.

Ĉu vi povus sendi orfon en la DR Kongo al la lernejo ĉi-jare? Legu pri kiel vi povas helpi en paĝo 10.